



PAIVA NETTO verkas "Scienco, Teknologio, Novigo, Kulturo kaj la rolo de Ekumena Solidareco".

BONA VOLO

DAŬRIPOVA ELVOLVIĜO

ANALIZOJ KAJ PERSPEKTIVOJ



João Grandino Rodas



Laura Bianchi



Sueli Periotto



Glauco Arbix

Scienco, Teknologio, Novigo kaj Kulturo: aliancanoj de daŭripova elvolviĝo kaj agantoj por forigi malriĉecon

LBV PREPARAS PROTAGONISTOJN DE PACO POR IA NOVA MONDA SCENEJO PER EDUKADO TRANS INTELEKTO



LBV
64-JARA

Legio de Bona Volo prezentas rekomendojn al partoprenantoj en la Altnivela Kunsido de la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro (Ekosok), de Unuiĝintaj Nacioj, en Genève, Svisujo, en la jaro 2013. LBV estas organizo el la brazila civila socio, kun statuso de ĝenerala konsultanto ĉe Ekosok, ekde la jaro 1999.



.....

La plibona mondo

povas komenciĝi
per unu sola gesto

.....

Plenumu
vian parton!

Sciu kie troviĝas LBV

CENTRA SIDEJO: Rua Sérgio Tomás, 740 • Bom Retiro • São Paulo/SP • Brazilo • CEP 01131-010 • Tel.: (+5511) 3225-4500 • www.lbv.org • www.bonavolo.com •
LBV DE ARGENTINO: Av. Boedo, 1.942 • Boedo • Buenos Aires • CP 1239 • Tel.: (+5411) 4909-5600 • www.lbv.org.ar • **LBV DE BOLIVIO:** Calle Asunta Bozo, 520 • Zona Alto Obrajes (sector A) • La Paz • Casilla de Correo, 5951 • Tel.: (+5912) 273-3759 • www.lbv.org.bo • **LBV DE PARAGVAJO:** José Asunción Flores, 3438 con Solar Guaraní • Bernardino Caballero • Asunción • Tel.: (+59521) 921-100/3 • www.lbv.org.py • **LBV DE PORTUGALIO:** Rua Comandante Rodolfo de Araújo, 104 • Bonfim • Porto • CP 4000-414 • Tel.: (+35122) 208-6494 • www.lbv.pt • **LBV DE URUGVAJO:** Bulevar José Batlle y Ordoñez, 4.820 • Aires Pures • Montevideo • CP 12300 • Tel.: (+598) 2304-4551 • www.lbv.org.uy • **LBV DE USONO:** 36 W 44th Street • Mezzanine • Manhattan • New York • 10036 • Tel.: (+1646) 398-7128 • www.legionofgoodwill.org



Helpu! www.legionofgoodwill.org

Banko Santander: Bankokodo: 0239 • Kontnumero: 13002754-6

Banko HSBC: Bankokodo: 0343 • Kontnumero: 63275-24



4

MESAÇO DE PAIVA NETTO

Scienco, Teknologio, Novigo, Kulturo kaj la rolo de Ekumena Solidareco



12

NIA AGADO

Por iu pli bona mondo kaj iu pli feliĉa Homaro

38 SCIENCO

Scienc produktado kaj daŭripova elvolviĝo

48 TEKNOLOGIO

Cifereca inkluzivigo kaj labormerkato

- Sociaj teknologioj kaj daŭripoveco (p. 54)
- LBV kunorganizas forumon pri teknologio kaj edukado ĉe UN (p. 58)

64 NOVIGO

Edukado kiu novigas kaj inkluzivigas

76 KULTURO

Kulturo de Paco kapabligas por kunlabora konstruado

ARTIKOLISTOJ

Fakuloj interŝanĝas pensojn pri la kvar temoj diskutataj: Scienco, Teknologio, Novigo kaj Kulturo.



44

João Grandino Rodas



60

Laura Bianchi



69

Glauco Arbix



72

Sueli Periotto

BONA VOLO
DAŪRIPOVA ELVOLVIĜO

Nepolitika, senpartia revuo pri Ekumena Spiriteco

Festa eldono de la 1-a de julio 2014, en la lingvoj angla, esperanta, franca, hispana kaj portugala.



BONA VOLO *Daŭripova Elvolviĝo* estas publikajo de LBV, eldonita de Eldonejo Elevação. Registrita sub n-ro 18166 en libro "B" de la 9-a Notarioficejo de Registro de Valorpajeroj kaj Dokumentoj en São Paulo.

DIREKTORO KAJ RESPONDECA REDAKTORO: Francisco de Assis Periotto – MTE/DRTE/RJ 19.916 JP

ĜENERALA KUNORDIGO: Gerdeilson Botelho kaj Rodrigo de Oliveira

ADMINISTRADO DE ENMERKATIGO KAJ KOMUNIKADO: Gizelle Tonin de Almeida

SKIPO DE ELDONEJO ELEVAÇÃO: Adriane Schirmer, Allison Bello, Andrea Leone, Angélica Periotto, Bettina Lopez, Camilla Custódio, Cida Linares, Daniel Guimarães, Eduarda Pereira, Felipe Duarte, Gabriela Marinho, Giovanna Pinheiro, Jéssica Botelho, Laura Leone, Leila Marco, Letícia Rio, Lísia Peres, Luci Teixeira, Mariane de Oliveira Luz, Neuza Alves, Raquel Bertolin, Rosana Bertolin, Roseli Garcia, Sílvia Fernanda Bovino, Valéria Nagy, Walter Periotto kaj Wanderly Albieri Baptista.

TRADUKO: Paulo Sergio Viana

FOTOGRAFIO: Eduardo Isaías (prilumado), Felipe Tonin, Helen Winkler kaj Vivian R. Ferreira


KOVRILFOTO: Vivian R. Ferreira

GRAFIKA DESEGNO: Helen Winkler / **KOMPOSTADO:** Diego Ciusz, Felipe Tonin kaj Helen Winkler

PRESADO: Mundial Gráfica

KORESPONDADRESO: Rua Doraci, 90 • Bom Retiro • CEP 01134-050 • São Paulo • Brasil • Tel.: (+5511) 3225-4969 • Caixa Postal 13.833-9 • CEP 01216-970 • Interreto: www.bonavolo.com / Retadreso: esperanto@bonavolo.com


Revuo BONA VOLO *Daŭripova Elvolviĝo* ne respondecas pri konceptoj kaj opinioj troveblaj en siaj subskribitaj artikoloj. La eldonajo obeas la altan celon stimuli diskutadon pri gravaj temoj brazilaj kaj tutmondaj kaj respreguli tendencojn de la nuntempa pensmaniero.



Scienco, Teknologio, Novigo, Kulturo kaj la rolo de Ekumena Solidareco



João Preda



José de Paiva Netto estas verkisto, ĵurnalista, radikronikisto, komponisto kaj poeto. Li estas direktoro-prezidanto de Legio de Bona Volo (LBV), efektiva membro de Brazila Asocio de Amaskomunikiloj (ABI) kaj de Brazila Asocio de Internaciaj Amaskomunikiloj (ABI-Inter). Li estas membro de Nacia Federacio de Ĵurnalistoj (Fenaj), de International Federation of Journalists (IFJ), de Sindikato de Profesiaj Ĵurnalistoj de Ŝtato Rio de Janeiro, de Sindikato de Verkistoj de Rio de Janeiro, de Sindikato de Radikomunikantoj de Rio de Janeiro kaj de Brazila Unuiĝo de Komponistoj (UBC). Li partoprenas ankaŭ Akademion de Beletro de Centra Brazilo. Li estas aŭtoro por internacia referenco pri konceptado kaj defendado de Ekumenaj Civitaneco kaj Spiriteco, kiuj laŭ li estas *“lulilo de plej grandanimaj valoroj, kiuj naskiĝas en la Animo, nome en la loĝejo de emocioj kaj de rezonkapablo prilumita de intuicio, medio, kiu enhavas ĉion, kio transcendas la vulgaran kampon de materio kaj devenas de la homa sublimita sentemo, kiel ekzemple Vero, Justeco, Kompatemo, Etiko, Honesteco, Frata Amo”*.

Mi havas la plezuron saluti la laboremajn subskribintojn de la ok Jarmilaj Evoluigaj Celoj, nome Ŝtatestrojn kaj Registarestrojn, reprezentantojn de internaciaj agentejoj, de la privata sektoro kaj de la civila socio, kiuj ĉeestas la Altnivelan Kunsidon de Ekonomia kaj Socia Konsilantaro (Ekosok), en la jaro 2013, ĉe Palais des Nations, la Oficejo de Organizo de Unuiĝintaj Nacioj en Genève (UNOG), Svisujo. Ni kune partoprenos ĉi tiun plian klopodon — kaj

ni alportos nian modestan kontribuon kaj apogon — favore al iu pli bona estonteco, en kiu ĉiuj homoj povu aliri vivon meritoplene dignan kaj egalecan laŭ devoj kaj rajtoj. Gravajn paŝojn oni entreprenis kaj plenumis, sed restas ankoraŭ multo farenda por ke ni povu travivi civitanecon al ni donitan de la komunuma vivo, solidaran tutmondan komunumon, kiun mi kutimas alnomi Ekumena Civitaneco. Kaj nia rimedo por starigi Ekumenan*¹ Civitanon estas io, kion ni ne rajtas rezigni: universaleca

***1 Ekumena —**
Ekumenismo, kiun mencias la aŭtoro, estas koncepto disvastigata de LBV de ĝia komenco en Brazilo, kiu rekapas la etimologian sendon de tiu termino — *“kun tutmonda atingo aŭ aplikebleco; universala”* — do, ne limigita al religia aspekto. Pro tio asertas la ĉefgvidanto de Legio de Bona Volo: *“Urĝas plifortigi ian ekumenismon, kiu transpasu barojn, kvietigu malamojn, estigu intersanĝadon de spertoj por instigi al tutmonda kreemo, konfirme al la valoro de soci-homama kunlaborado, kiel ekzemple ĉe popolaj kooperativoj, kie virinoj havu fortan plenumadon, se oni elstarigas la faktan, ke ili estas tute kontraŭaj al forĵetado. Fakte, estas multo lernebla, unuj kun la aliaj”*.



Eduarda Pereira

Plej potenca rimedo kontraŭ tutmonda mizero

Legio de Bona Volo (LBV) de 64 jaroj bataladas ĉiutage kontraŭ malsato kaj malegalecoj, favore al daŭripoveco, kaj ĝi neniam forgesas entrepreni herkulanan alfrontadon kontraŭ plej granda manko, kiu rekte baras la sukceson de iu ajn klopodo bonfare transformi la Teron: manko de solidareco, de frateco, de kompatemo, de justeco; sekve, regas dezerto en la Spirito, en la koro.

Pro tio, mi ŝatus komence rememorigi al ĉiuj tion, kion mi skribis en revuo *Tutmondigo de la Frata Amo*, kiun oni sendis al la Altnivela Kunsido de Ekosok, en la jaro 2007, farita ankaŭ ĉe Palais des Nations. Per ĝi mi prezentis interalie pecon de la intervjuo, kiun mi donis je la 18-a de oktobro 1981 al la itala ĵurnalisto, kiu loĝas en Brazilo, nome **Paulo Parisi Rappoccio**, en kiu mi asertas, ke **Solidareco** plivastiĝis en la luma kampo de etiko kaj **prezentiĝas kiel strategio**, tiel ke la homo povu atingi kaj garantiigi **sian postvivadon**. Kontraŭ tutmondigo de mizero ni kontraŭmetas tutmondigon de Frateco, kiu spiritecigas kaj nobligas Ekonomion kaj solidare ĝin disciplinas, kiel fortan rimedon por reago kontraŭ falsa fataleco de malriĉeco. (...) Oni ne petu subitan miraklon — kvankam nenio estas malebla — sed la plifortigon de idealo, kiu stariĝu, iom post iom, ĝis ĝi kompletigos sian eksterordinaran laboron.

Kaj tiel mi finis tiun parton de mia parolado al ĵurnalisto Paulo Parisi.

Solidareco por atingi celojn

Estas esence grave kunigi la formulon Teknologio, Scienco, Novigo kaj Kulturo al Ekumena Solidareco, por ke oni plej

En la jaro 2007, okaze de Altnivela Kunsido, ĉe la oficejo de UN, en Genève, Svisujo, la reprezentantoj de LBV, el maldekstre: **Noys Rocha** (Portugalujo), **Maria de Albuquerque** (Usono) kaj **Rosana Bertolin** (Brazilo), portanta la revuon de ĉi tiu institucio. Dekstre, s-ino **Hanifa Mezoui**, tiama estro de la Sekcio pri NRO-oj en la Departemento pri Ekonomiaj kaj Sociaj Aferoj de Unuiĝintaj Nacioj. En la mezo, la ĝenerala sekretario de UN, **Ban Ki-moon**, kiu tiam esprimis sian apogon al la agado de LBV kaj subskribis la kovrilon de la revuo *Globalization of Fraternal Love*. Tiu ekzemplero troviĝas en ekspozicio en la galerio de honorobjektoj ĉe Templo de Bona Volo, en Brasilia, Brazilo.

spirito, kies perilo estas Solidareco, kiu prilumas mensojn kaj sentojn. Ekumena Civitano estas tiu, kiu ne perdas tempon ĉe netoleremaj konfliktoj kun la ceteraj homoj — pro tio, ke ili ne havas saman socian, politikan, religian penson, aŭ ne apartenas al sama kulturo aŭ etno —, sed kiu kunigas fortojn por malpliigi la premegantan mankon, kiu malhelpas komunumojn, homamasojn aŭ unu solan homon.

Sekve, la temo proponita por tiu evento de Ekonomia kaj Socia Konsilantaro de Unuiĝintaj Nacioj (Ekosok) ne povus esti pli oportuna kaj aktuala: “Scienco, Teknologio kaj Novigo, kaj la eblecoj de kulturo por starigo de daŭripova elvolviĝo”.



TUTMONDIGO DE FRATA AMO (PDF)

La leganto enŝutu en sian komputiltelefonon aŭ tabulkomputilon QR Code, fotu la kodon kaj legu ĉi tiun publikajon de LBV.

urĝe faru tiun transigon al plena, daŭripova elvolviĝo. Se oni unuigas tiujn rimedojn por progreso laŭ aŭtentika senco de Frata Amo kaj Justeco, kiu nin distingas de ferocaj bestoj, tiam ni povos ĉesigi la teruraĵojn, kiuj ankoraŭ persistas en la mondo — laŭ ili troviĝas listigitaj ĉe la ok Celoj de la Jarmilo — nome, malsato; mizero; manko de alirebleco al bonkvalita edukado; malrespekto al egaleco inter seksoj kaj al virinoj kaj knabinoj; infanmortoj; nehomaj kondiĉoj por gravedulinoj; aidoso, malario, inter aliaj gravegaj malsanoj, kiuj mortigas tutajn loĝantarojn; damaĝado al naturmedio, k.t.p.. Krom venko super ĉiuj tiuj malbonaĵoj — kiom ajn longe daŭros la batalado — estas nia devo kune konstrui novan modelon por elvolviĝo, kiu efektive konservu la vivon sur ĉi tiu mondo.

Tutmondigo de mizero kaj la centro de Altruisma Ekonomio

En mia artikolo “Sendependeco”, publikigita per *Correio Braziliense*, en la brazila ĉefurbo, je la 7-a de septembro 1986, mi emfazis, ke la homo, kun sia Eterna Spirito, estas la centro de Altruisma Ekonomio, nome la generanto de ĉia progreso. Sen li, ne eblas laboro, nek kapitalo, nek konsumanta merkato.

Gandhi (1869-1948) diris, ke

— *Kapitalo en si mem ne estas malbona; malbona estas neĝusta uzado de ĝi.*

La riĉeco de iu lando staras en la koro de ĝia popolo. Tamen, tutaj nacioj ankoraŭ suferas mizeron. Konvenas memori, ke malplenaj stomakoj kaj elreviĝintaj Spiritoj ĝenerale ne emas aŭskulti. (...)

En tempo, kiam pro progreso de teknologio la perspektivoj de produktado



Arifindo Filho

Paiva Netto kunfratiĝas kun ĵurnalistoj **Paulo Parisi** (meze) kaj **José Carlos Araújo** (dekstre), radiparolisto pri sportaj eventoj, prezentanto ĉe Grupo Bandeirantes de Komunikado kaj artikolisto ĉe revuo *BONA VOLO*.

superas la prognozojn, **malsato estas fakte skandalo!** Ne nur tiu de la korpo, sed ankaŭ tiu de scio, tio estas, spiriteca Edukado, sen kiu neniu popolo estas forta. Anakronisme, neniam la mondo vidis unuflanke tiom da bonhavaĵoj, kaj aliflanke tiom da malhavo. Kaj tio certe povos konduki la mondon al nova serio da neimageblaj militoj kaj nepenseblaj epidemioj. Omnibusoj, kamionoj, ŝipoj, aviadiloj jen prezentiĝas por disvastigi ilin. Ĝi estas tutmondigo de mizero kaj do de malsato kaj de plej mirigaj malsanoj (...).

Revene al la intervjuo, kiun mi donis al mia kolego-ĵurnalista Paulo Parisi, mi emfazas, ke fariĝis urĝa afero prilumi Ekonomion per etika lumo de Karitato*², por ke senmezura ambicio pri kapitalo, tio estas, korupto kaj monavidado, ne detruu demokration — ni diru — firmigitan en iuj lokoj kaj komenciĝantan en aliaj. Male, ni plu vidados, teruritaj, la neadon al rajto pri libereco, pri vivo, pri sano, pri edukado, pri laboro kaj pri feliĉo, flanke de homamasoj, kiuj aŭdacis naskiĝi.

Sublimigita teknologio

Ni ne rajtas vivi izolitaj en ia teknologia veziko, sen kundividado de ĝiaj bonfaroj, do eksklude al loĝantaroj



Arquivo BV

Gandhi

*² **Karitato** — Legu pli pri la ampleksa difino, kiun la aŭtoro faras pri tiu temo, en la revuoj *Solidara Socio*, *Tutmondigo de la Frata Amo* kaj *Paco por la Jarmilo*. Aliru: www.bonavolo.com. Pri tiu esence grava sento, Paiva Netto skribis krome: “*Karitato estas la gravita centro de ideologia konscio, do eduka, politika, socia, filozofia, scienca, religia, arta, sporta, hejma kaj publika de Spiriteca Civitano, tiel ke — se la homo ne havas komprenon pri ĝi — tiam li devas klopodi kompreni ĝin, por ke li plu vivu en sia propra persona intimo*”.

(...) fariĝis urĝa afero prilumi Ekonomion per etika lumo de Karitato, por ke senmezura ambicio pri kapitalo, tio estas, korupto kaj monavido, ne detruu demokration — ni diru — firmigitan en iuj lokoj kaj komenciĝantan en aliaj. Male, ni plu vidados, teruritaj, la neadon al rajto pri libereco, pri vivo, pri sano, pri edukado, pri laboro kaj pri feliĉo, flanke de homamasoj, kiuj aŭdacis naskiĝi.

sen alirebleco al rafinita scienco. Jen estas granda defio en la diskutoj, kiujn ni starigas ĉi tie, en ĉi tiu evento, ĉe Unuiĝintaj Nacioj.

En la jardeko post 1980, mi verkis por la ĵurnalo *Folha de S. Paulo*, el la ĉefurbo de la Subŝtato São Paulo, en Brazilo, kaj mi asertis, ke neniam ajn la civilizacio atingis tian gradon de teknologio. Mi tuj demandis kaj mi tuj respondis: Kio do mankas, por ke estu Paco? Mankas sublimigi la agojn por progreso per Ekumena Spiritualeco, kiu potencie nin akompanas — ĉu ni konscias aŭ ne, ĉu ni volas aŭ ne, kaj pro tio ni, popoloj, plu vivadas.

Rajto pri defendo

(...) Ni devas ĉiam bataladi por Paco. Tamen, ni ne estu senkapablaj defendi nin, kompreneble sen feroca, detruema spirito de venĝo, ĉar ĉi tiu morale konfuzas la homojn. Do, ni neniam estu kunkrimantoj ĉe misfaroj, sed ni aldonu al nia Animo tiun altan civilizigan aliancon per sento de bonfaremo, kiu naskiĝas el la koro (...). Por fari mian penson pli klara, mi uzas ĉi tiun admonon de **Konfuceo**, al kiu mi frue aliĝis. Li diras, el sia alta, miljara saĝo:

— *Oni pagu Bonon per Bono, sed malbonon per Justo.*

La konata ĉina pensulo evidente ne aludis al revenĝo, kiu estas kontraŭa al senco de vera Justo.

Civilizacio kaj teknologio por Paco

En revuo *Paco por la Jarmilo*, speciale ellaborita por la Konferenco de Supera Instanco de Monda Paco por la Jarmilo, sub la aŭspicio de UN, en aŭgusto 2000, ĉe la sidejo de tiu Organizo en New

York, mi demandis: Ĉu mankas io al la tutmondiga teknologio? Jes, mankas koro kaj menso (tio estas, pli granda kunlaborado inter sentoj kaj intelekto), tutmondigo de Solidareco, tiel ke interalie interreto estu pli kaj pli potenca vojo al Paco kaj al transformoj, inkluzive de sociaj transformoj, kaj ne ia senekvilibra nervosistemo de teknologia socio.

Pro tio ni proponas kunvivadon en Solidara, Altruisma, Ekumena Socio, en kiu ne estu loko por konstanta manko de homamo flanke de la Homaro mem, kio kaŭzas tiom da viktimoj dum la evoluproceso. Tamen, se ne ekzistus progreso, ni ankoraŭ vivadus en primitiva tempo de la homo.

En la paĝo “Inklino al progreso”, en *Jornal de Brasília*, brazila ĉefurbo, je la 16/11/2010, per kiu mi reproduktas pecojn el mia verko *Civitaneco de la Spirito* (Eldonejo Elevação, 2001), mi argumentis, ke kiam Scienco transiros la limojn starigitajn ne de Scienco mem, sed de iuj timemaj korifeoj de ĝia luma kampo de agado, tiam la Homaro ne plu vidos barojn kontraŭ la plenumado de sia majesta destino de civilizita civilizacio...

Sen Ekumena Frateco, ne eblas mondo

Mi ĉiam pledis kaj enmetis en miajn artikolojn, en la amaskomunikilojn kaj en interreton: ne ekzistas limoj al la solidara plivastigo de la Kapitalo de Dio: la homo kun sia Eterna Spirito.

Sekve, plej bona disvolvenda teknologio en ĉi tiu tempo de senbrida tutmondigo, estas tiu de memkono. Ĝi estas pli alta ol ia ajn teknologia malkovro, ĉar ĝi povas malhelpi, ke la individuo (kun aŭ sen informadiko) falu komplete en suferadon pro renversiĝo en plej kompletan barbarecon.

Sen tiu sento pri Ekumena Frateco, ni estingus la mondon, kaj tamen **plu havante niajn brilajn cerbojn, sed niajn senlumajn korojn.** La dezirata socia reformo ne alvenos plene se oni ne alte konsideros la Spiriton de civitanoj (aŭ civitaninoj). (...) **La mondo ja bezonas reformon, ĉiam, ke oni donu al ĝi panon kaj edukadon; tamen, ĝi egale bezonas la nemalhaveblan nutraĵon de Amo kaj, sekve, respekton.**

Solidareco kaj Frateco estas precize brulaĵoj, kiuj motivas diligentan agadon de ĉiuj idealistaj, sociaj agantoj en la internacia komunumo.

Pacon kaj interkomprenon inter la popoloj

Se do teknologio transpasas super homaj baroj — interreto estas ekzemplo pri tio —, tiam estas esence grave, ke Solidareco elvolviĝu antaŭ ĝi, por prilumi ĝiajn vojojn. Ni neniam havis pli oportunan momenton por montri, kiel potencie grandaj estas la eblecoj uzi ĝin por servi la popolojn.

Ni alvoku Sciencon, Teknologion, Novigon kaj Kulturon, ne forgesante altan spiriton de homa solidareco, por ke ni povu fine de tiu renkontiĝo kune ĉirkaŭbraki programon de agado surbaze de komuna interkompreniĝo, kiun la membroj de UN, ekde ĝia fondiĝo, celas, same kiel Virinoj, Viroj, Junuloj, Infanoj kaj la Spiritoj de efektiva Bona Volo.

Mi tre dankas vin ĉiujn!

Mi adiaŭas kun vorto de Paco de tiuj, kiuj laŭlonge de la historio klopodis kaj klopodas konstrui ian pli bonan mondon:

— *“Novan Ordonon Mi donas al vi: Vi amu unu alian, kiel Mi vin amis. (...) Neniu havas Amon pli grandan ol tio, ke iu demetus sian Vivon por siaj*

amikoj” (Evangelio laŭ **Johano**, 13:34 kaj 15:13).

Jesuo Kristo

— *“Vi neniam atingos virton, se vi ne faros karitaton per tio, kion vi plej ŝatas. Kaj sciu, ke pri via tuta farata karitato Alaho ĉion scias”.*

Profeto Muhammad (570-632) — *“Paco kaj beno de Dio estu sur li!”* — Islamo.

— *“Dio kreis la homon tia, ke li povas esti feliĉa nur se li praktikas Bonon”.*

Alziro Zarur (1914-1979), ĵurnalisto, radikronikisto, verkisto, poeto kaj sociaktivulo. Li fondis Legion de Bona Volo (LBV) je la 1-a de januaro 1950 (Tago de Universala Paco kaj Kunfratiĝo).

— *“Konstruado de paca mondo ne estas io, kion oni povas fari per redaktado de traktaĵo. Necesas tempo por ellaborado de rilatoj inter la homoj; sed se ni deziras Pacon, ni devas fari tion”.*

Eleanor Roosevelt (1884-1962), eksĉefdamo en Usono, admirinda prezidanto de Komisiono pri Homaj Rajtoj de UN.

— *“Justeco estas la apogilo por la mondo kaj maljusteco estas la fonto de ĉiuj katastrofoj, kiuj afliktas ĝin. Se homamo, kompatemo, sentemo estas virtoj necesaj por la socio, la foreston de tiuj dispozicioj oni devas konsideri malŝatinda kaj krima”.*


Barono d’Holbach (1723-1789) francgermana ateisto-filozofo, enciklopediisto.

— *“Ni ne volas malriĉigi riĉulojn aŭ malfortigi potenculojn. Ni volas ekvilibron de fortoj kaj pli justan alireblecon de*

Se do teknologio transpasas super homaj baroj — interreto estas ekzemplo pri tio —, tiam estas esence grave, ke Solidareco elvolviĝu antaŭ ĝi, por prilumi ĝiajn vojojn. Ni neniam havis pli oportunan momenton por montri, kiel potencie grandaj estas la eblecoj uzi ĝin por servi la popolojn.




Jesuo




Alziro Zarur




Eleanor Roosevelt



Barono d'Holbach




Oswaldo Aranha



Majmonido



Anália Franco




Karl Marx



Wangari Maathai



Siddharta Gautama



Albert Einstein

popoloj al rimedoj por prospero kaj al fontoj de bonfarto por la homaro”.

Oswaldo Aranha (1894-1960), brazila advokato, politikisto kaj diplomatiisto, per parolado en la 12-a Ordinara Sesio de la Ĝenerala Asembleo de Organizo de Unuiĝintaj Nacioj, en la jaro 1957.

— *“Bonfarton dum la vivo oni havigas per perfektigado de bona kunvivado inter la homoj”.*

Majmonido (1135-1204), juda kuracisto, filozofo kaj teologo.

— *“Mi revas pri tago, kiam ĉiuj stariĝos kaj ekkomprenos, ke ili estis faritaj por kunvivi kiel fratoj”.*

Nelson Mandela, advokato, eksprezidento de Sudafriko kaj Nobelpremiito pri Paco (1993-2014).

— *“Al ĉiu suferanto kaj solulo donu ĉiam rideton de ĝojo. Ne donu al ili nur viajn zorgojn, sed ankaŭ vian koron”.*

Patrino Tereza el Kalkuto (1910-1997), religia misiisto kaj Nobelpremiito pri Paco (1979).

— *“Ni devas ami unu la alian: tiujn, kun kies opinioj ni konsentas, same kiel tiujn, pri kies opinioj ni malkonsentas”.*

Sankta Tomaso, la Akvinano (1225-1274), katolika filozofo kaj teologo.

— *“Socia laboro bezonas mobilizon de fortoj. Ĉiu homo kunlaboras per tio, kion*

li scipovas fari aŭ per tio, kion li havas por doni. Tiel oni plifortigas la strukturon, kiu subtenas agadon kaj ĉiu sentas, ke li estas ĉelo por la transformado de la lando”.

Zilda Arns (1934-2010), brazila sanitar- kaj infankuracisto, fondinto de Porinfana Servo.

— *“Se la homoj metus sian devon sur la unuan lokon kaj poste la sukceson, ĉu ili ne plibonigus sian karakteron?”.*

Konfuceo (551-479 a.K.), ĉina pensulo kaj filozofo.

— *“Arboj estis esenca parto de mia vivo kaj ili instruis al mi multajn lecionojn. Ili estas vivantaj simboloj pri paco kaj espero. Arbo havas siajn radikojn en la grundo, kaj eĉ tiel ĝi starigas sin direkte al la ĉielo. Ĝi diras al ni, ke por havi iun aspiron, ni devas firme stari sur fundamento, kaj ke eĉ se ni povas atingi tre alten, tamen el niaj radikoj ni elprenas nian subtenantan bazon”.*

Wangari Maathai (1940-2011), kenja profesorino kaj politikaktivulino pri naturmedio kaj Nobelpremiito pri Paco (2004).

— *“Ne eblas paco, nek progreso, se ankoraŭ ekzistas diskriminacio kaj perforto kontraŭ virinoj”.*

Michelle Bachelet, kuracistino, politikisto, eksprezidento de Ĉilio kaj eksplenumdirektoro de UN-Virinoj.



Nelson Mandela



Patrino Tereza el Kalkuto



Sankta Tomaso, la Akvinano



Zilda Ams



Michelle Bachelet



Billy Graham

— “*Sen pardono ne eblas estonteco por interrilatoj inter individuoj kaj inter nacioj*”.

Desmond Tutu, anglikana ĉefepiskopo kaj Nobelpremiito pri Paco (1984).

— “*Ne ekzistas feliĉa vivo, ĉu individue, ĉu kolektive, sen idealo*”.

Anália Franco (1856-1919), brazila instruistino, spiritisto, ĵurnalisto, poeto kaj filantropo.

— “*Problemo aperas nur kiam ĉeestas ĉiuj materiaj kondiĉoj por solvi ĝin aŭ almenaŭ ĉi tiuj estas en formiĝado*”.

Karl Marx (1818-1883), germana materiisto, ateisto, ekonomikisto kaj historiisto.

— “*Kiam ŝipĉarpentisto bezonis lignon por fari maston por velŝipo, tiam li ne serĉis ĝin en valo, sed sur altaĵo de montaro, kie ventoj vipas arbojn. Tiaj arboj, li sciis, estis la plej fortaj. Ni ne elektas niajn suferojn, sed se ni alfrontas ilin brave, tiam ili povos hardi la fibrojn de nia animo*”.

Billy Graham, usona protestanta religiulo.

— “*Malamo ne detruas malamon; nur amo detruas malamon. Jen ĉi tiu estas eterna leĝo*”.

Siddharta Gautama (proksimume 556-486 a.K.), Budho, fondinto de Budhismo.

— “*Pacon oni ne povas tenadi per forto. Oni povas atingi ĝin nur per interkompreno*”.

Albert Einstein (1879-1955), judgermana teorifizikisto kaj Nobelpremiito pri Fiziko (1921).

— “*Malpleno estigas malplenen. Sed enhavo konstruas liberecon, precipe se ĝi havas kiel subtenon la fundamentojn de la Spirito, kiu baziĝas sur la Eterna Vivo*”.

D-ro **Adolfo Bezerra de Menezes Cavalcanti** (Spirito) (1831-1900), respektata kuracisto, militisto, verkisto, ĵurnalisto kaj politikisto, konata en Brazilo kiel “Kuracisto de Malriĉuloj”.

— “*Pia homo estas bonvolema al ĉiuj. Li estas bonvolema pro sia saĝeco, pro sia kompreno pri vero, pro la bonkoreco de siaj pensoj, per siaj paroloj, per siaj agoj*”.

Zaratuŝtro (628-551 a.K.), fondinto de Zaratuŝtrismo.

— “*Ekzistas nur unu afero sur ĉi tiu mondo, pri kiu valoras la penon dediĉi la tutan vivon. Tio estas la estigo de pli da amo inter la popoloj kaj la detruado de baroj, kiuj ekzistas inter ili*”.

Leo Tolstoj (1828-1910), rusa verkisto. ■

paivanetto@lbv.org.br

www.paivanetto.com



Desmond Tutu



Konfuceo



D-ro Bezerra de Menezes



Leo Tolstoj



Zaratuŝtro

Por iu pli bona mondo kaj por iu pli feliĉa Homaro

Fondita je la 1-a de januaro 1950, la Tago de Paco kaj de Universala Kunfratiĝo, fare de radikronikisto, ĵurnalisto, verkisto kaj poeto **Alzira Zarur** (1914-1979), en **Rio de Janeiro**, Brazilo, Legio de Bona Volo alportis en la mondon sian viglan mesaĝon de Frateco kaj Amo. Laborado favore al senhavuloj akompanas la agadon de ĉi tiu Institucio de la komenco. Nuntempe, ĝi agadas en urĝaj situacioj, portante humanecan helpon, krom proponado de socia apogo kaj de komfortigaj paroloj al familioj kun malgranda enspezo.

En la jaro 1979, ĵurnalisto, verkisto, radikronikisto kaj edukanto **José de Paiva Netto** akceptis la prezidantecon de LBV kun la kompromiso plivastigi la atingon de tiu solidara agado. Li inaŭguris modelajn lernejojn, komunumajn ▶





Leila Tonin



Enŝutu QR Code en vian komputiltelefonon, fotu la kodon kaj ekkonu la rekomendojn de LBV por la Altnivela Kunsido de Ekonomia kaj Socia Konsilantaro de Unuiĝintaj Nacioj, de la 1-a ĝis 4-a de julio 2013, ĉe oficejo de UN en Genève, Svisujo.



I NIA AGADO

Instituto por Edukado José de Paiva Netto, en **São Paulo**, Brazilo, montras, ke altkvalita Edukado, Solidareco kaj Ekumena Spiriteco estas nemalhaveblaj por formiĝo de plena civitano. Tiaj valoroj respegulas Pedagogion de Amo kaj Pedagogion de Ekumena Civitano, pri kiuj Paiva Netto pledas kaj estas sukcese aplikataj en la instrureto kaj en sociedukaj programoj de tiu Institucio. Sur granda kolono, apud la frontispico, la estro de LBV gravurigis per oraj literoj ĉi tiun maksimumon de **Aristotelo** (384-322 a.K.): “Ĉiuj, kiuj pripensis la arton regi la homan genton fine konvinkiĝis, ke la sorto de imperioj dependas de edukado de la junularo”. Tiuloke:



São Paulo (Brazilo)

La misio de LBV

**Starigi Socian Evoluon,
Edukadon kaj Kulturon kun
Ekumena Spiriteco, por ke
estu Soci-media Konscio,
Nutrado, Sekureco, Sano kaj
Laboro por ĉiuj, je la vekigo
de Tutmonda Civitano.**

- ▶ centrojn por socia asistado kaj hejmojn por maljunuloj. Ĉe tiuj lokoj oni ĉiutage akceptas milojn da infanoj, adoleskantoj, junuloj kaj plenaĝuloj en situacio de vundebleco. Sociedukaj agadoj, siavice, etendiĝas al lernantoj en publikaj lernejoj.


Paralele al la klopodado pli kaj pli starigi edukadon kaj alporti sociasistan subtenon al komunumoj kun malalta enspezo, kune kun ekumenaj, universalaj valoroj, dum kelkaj jardekoj LBV ampleksigis sian proponon de komunikado engaĝe kun sociaj kaj naturmediaj pledoj cele al aliaj niveloj: el radio kaj gazetaro, ĝi venis al televido, interreto kaj alternativaj komunikiloj. Tiel ĝi komencis elvolvi



LBV BRAZILIO

Legio de Bona Volo estis kreita oficiale je la 1-a de januaro 1950 (Tago de Paco), en la urbo Rio de Janeiro, Brazilio, fare de ĵurnalisto, radikronikisto kaj poeto Alziro Zarur (1914-1979), kiu estis anstataŭita ĉe la prezidanteco de la Instituto fare de (ankaŭ) ĵurnalisto, radikronikisto kaj verkisto José de Paiva Netto.

Kvanto da asistoj kaj bonfaroj de Legio de Bona Volo de 2009 ĝis 2013*



*De pli ol du jardekoj, Legio de Bona Volo havas sian ĝeneralan bilancon analizata de sendependaj kontrolistoj, kaj tio estas iniciato de José de Paiva Netto, direktoro-prezidanto de LBV, longe antaŭ ol la leĝo postulis tion.




+ ol 220 MIL

Jen estas la kvanto da homoj atingitaj per la agado de LBV ĉe ĝiaj sociedukaj programoj en lernejoj, komunumaj centroj por socia asistado, maljunulejoj kaj per ĝiaj instituciaj kampanjoj.

77

sociedukaj instalaĵoj en la tuta Brazilio



+ ol 11 MILIONOJ

da asistoj kaj bonfaroj al familioj kaj homoj en situacio de vundebleco aŭ socia risko.



Krom lernejoj, komunumaj centroj por socia asistado kaj maljunulejoj, LBV utiligas propran reton de socia komunikado (radio, TV, interreto kaj publikaĵoj), por enkonduki edukadon, kulturon kaj valorojn de civitaneco.

ĈEESTO DE LBV EN LA MONDO



TIPOJ DE ASISTADO



Hejmoj por maljunuloj



Komunumaj Centroj por
Socia Asistado



Lernejoj



Instituciaj kaj urĝaj
kampanjoj

SOCIEDUKA LABORO

Nuntempe Legio de Bona Volo ĉeestas en sep landoj: krom en Brazilo, kie ĝi originis, LBV havas memstarajn bazojn en Argentino, Bolivio, Paragvajo, Portugalio, Urugvajo kaj Usono. Ĝi estas rekonata alilande pro siaj agadoj en la edukaj kaj socialistaj centroj kaj pere de kampanjoj por konsciigo kaj socia mobilizo, sub la distingiĝo de Edukado kun Ekumena Spiriteco.



Sorocaba (Brazilo)

- ▶ programojn kaj projektojn, en kiuj elstaras la uzado de novaĵoj kaj sociaj teknologiaĵoj, kun emfazo en formado de socia kaj naturmedia konscienco.

La asista reto de Legio de Bona Volo ĉeestas en sep landoj. Ili estas proksimume 100 propraj instalaĵoj, en Sudameriko kaj Nordameriko kaj en Eŭropo. Nur en la jaro 2013, LBV plenumis pli ol 11 milionojn da asistoj kaj bonfaraj agoj al homoj kaj familioj kun malalta enspezo. En tiuj lokoj, tiu Instituto aplikas sian edukan linion, kiu konsistas el Pedagogio de Amo (por infanoj ĝis la 10-a aĝojaro) kaj Pedagogio de Ekumena Civitano (post la 11-a aĝojaro), kun propra metodologio. Tiu instruplatformo — kiu direktas ankaŭ la sociedukajn instruprogramojn en la Organizo — proponas pli ol lernobjektan kadron, ĉar ĝi klopodas meti en praktikon la konscion pri



Teresina (Brazilo)



Taguatinga (Brazilo)

I NIA AGADO

Arquivo BV



Belém (Brazilo)


En la urbo Belém, Brazilo, Lernejo por Infan-Edukado Jesuo situas ĉe Travessa Padre Eutíquio, 1976, Batista Campos. Por aliaj informoj, telefonu (+5591) 3225-0071 aŭ aliru www.lbv.org/belem.

Vivian R. Ferreira



Fortaleza (Brazilo)

Taitiane Silva



Salvador (Brazilo)

Leilla Tonin



Ananindeua (Brazilo)

Leilla Tonin



João Pessoa (Brazilo)

Vivian R. Ferreira



Recife (Brazilo)



Vincius Ramato

Curitiba (Brazilo)

- ▶ civitaneco, kiu kapablas disvastigi valorojn de Ekumena Solidareco kaj de Kulturo de Paco (vidu paĝon 72).

LBV ĉe UN

La internacia atingo de la agado de Legio de Bona Volo estis rekonita de Organizo de Unuiĝintaj Nacioj (UN). Ekde la jaro 1994, LBV agadas kunlabore kun la organizo, per la Departamento de Publika Informado (DPI). En 1999, ĝi estis la unua civila brazila asocio, kiu havigis al si statuson de ĝenerala konsultanto ĉe Ekonomia kaj Socia Konsilantaro (Ekosok/UN), kun unuanima aprobo flanke de reprezentantoj de 28 landoj, kiuj rajtas voĉdoni. Tia stato permesas, ke LBV partoprenu kaj kontribuu en diskutado pri temoj de Ekosok en New York (Usono), en Genève (Svisujo) kaj en Wien (Aŭstrujo). Tiel, la Institucio frate



Vivian R. Ferreira

Goiânia (Brazilo)

En Curitiba, Brazilo, LBV funkciigas Centron por Infan-Edukado José de Paiva Netto, kiu situas ĉe Rua Padre Estanislau Trzebiatowski, 180, Boqueirão. Por aliaj informoj, telefonu (+55 41) 3386-8430 aŭ aliru www.lbv.org/curitiba.



Leilla Tonin

Foz do Iguaçu (Brazilo)



Aracaju (Brazilo)



Tatiane Oliveira

Fred Massa



Belo Horizonte (Brazilo)

Carla Mônica



Maringá (Brazilo)

Paulo Araújo



Sorocaba (Brazilo)

Lella Tonin

▶ prezentadas rekomendojn koncerne la enkondukon de publikaj politikoj kaj humanecaj internaciaj agadoj.

En la jaro 2000, ĝi komencis partopreni la Konferencon de NRO-oj kun Konsultaj Rilatoj al Unuiĝintaj Nacioj (Kongo), kies sidejo staras en Wien. En 2004, ĝi kunfondis Komitaton de NRO-oj pri Spiriteco, Tutmondaj Valoroj kaj Interesoĵ ĉe Unuiĝintaj Nacioj.


En la jaro 2010, Legio de Bona Volo de Usono inaŭguris novan oficejon por reprezentado en New York. Per tiu faro, ĝi plifortigas la aktivan voĉon de la latinamerika civila voĉo ĉe Unuiĝintaj Nacioj, precipe ĉe Ekonomia kaj Socia Konsilantaro.

Reto Solidara Socio

LBV krome kunlaboras kun ok Jar-milaj Evoluigaj Celoj, per kunordigado inter diversaj sociaj agantoj, aŭspiciante



En Genève, Svisujo, aŭtoritatoj akceptis de reprezentantoj de LBV specialan publikaĵon de tiu Instituto por Altnivela Kunsido 2011. Inter ili (1) ĝenerala sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, **Ban Ki-moon**, (2) **Nikhil Seth** (maldekstre), direktoro de Departemento de Ekonomiaj kaj Sociaj Aferoj de UN, kaj **Asha-Rose Migiro**, tiama ĝenerala vicsekretario de Unuiĝintaj Nacioj. (3) En la jaro 2012, en New York/Usono, **Michelle Bachelet** (dekstre), tiama ĝenerala sekretario de Unuiĝintaj Nacioj kaj plenum-direktoro de UN-Virinoj, akceptas de sociologo **Sandra Fernandez**, reprezentanto de LBV, la revuon BONA VOLO *Virino*.



renkontiĝojn kaj temo-atelierojn en urboj de Latinameriko kaj Eŭropo. El tiu aro da agadoj kreiĝis Reto Solidara Socio, nome movado, kiu kunlaboradas je regiona nivelo por ampleksa intersektora agado favore al daŭripova, tuteca elvolviĝado.

Intersektoraj donacoj kaj kunlaborado en la civila socio estas periloj, kiuj ebligas, ke LBV tenadu siajn instalaĵojn por socia kaj instrua asistado. Tio koncernas same al kampanjoj sociedukaj kaj valorigantaj la Vivon kaj al iniciatoj de socia mobilizo. En ĉiuj tiuj agadoj, evidentiĝas la unikeco de Edukado kun Ekumena Spiriteco.

Altnivela asistado, altkvalita edukado, kontrolebla administrado, fekunda interrilatado kun la socio kaj vastatinga socia laboro distingas Legion de Bona Volo kiel gravan kunaganton de humanecaj movadoj en la mondo. ■



TV UN ELSENDAS PAROLADON DE LBV

Okaze de diskutoj je la 6-a de julio 2012, la reprezentanto de LBV ĉe Unuiĝintaj Nacioj, Danilo Parmegiani (dekstre), prezentis la laboron de la Instituto per parolado elsendita per Radio kaj TV UN, en la sama momento, al la tuta mondo. Apude, la prezidanto de Konferenco de NRO-oj kun Konsultaj Rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj (Kongo), situanta en Wien, Aŭstrio, **Cyril Ritchie**.



64-JARA

Nia agado



Argentino



Bolivio



Brazilo



Paragvajo



Portugalujo



Urugvajo



Usono



Vivian R. Ferreira



Nicole Angel



Vivian R. Ferreira



Vivian R. Ferreira



Vivian R. Ferreira





El Alto (Bolivia)

Andrea Varela



Rio de Janeiro (Brazilo)

Nathália Valério



Belém (Brazilo)

Vivian R. Ferreira



Asunción (Paragvajo)

Raquel Díaz



LERNEJOJ

La instalaĵoj de LBV por instruado havas la taskon eduki kun Ekumena Spiriteco, formante “*Cerbon kaj Koron*”. Ili celas starigi elvolviĝon de intelekto kaj de sentoj, kun efikeco kaj kompetenteco. La agado inkluzivas ĉiujn etapojn de la baza edukado, same kiel la Edukadon de Junuloj kaj Plenaĝuloj.



Arkivo BV

Montevideo (Urugvajo)



Arkivo BV

Buenos Aires (Argentino)



José Gonçalves

Taguatinga (Brazilo)



La Paz (Bolivio)

Laila Tonin
Vinicius Ramôa



Curitiba (Brazilo)



Teófilo Otoni (Brazilo)



Teófilo Otoni (Brazilo)

Mônica Mendes
Lailia Tonin



Uberlândia (Brazilo)

Ledilaine Santana



Volta Redonda (Brazilo)

Lailia Tonin



ŜIRMEJOJ POR MALJUNULOJ

Tri instalaĵoj de LBV akceptas maljunulojn senapogajn kaj/ aŭ forigitajn el la familia grupo. La agado inkluzivas nutran akompanadon, kuracistan kaj flegistan asistadon kaj laborterapion.



Arkivo BV

Mogi das Cruzes (Brazilo)



KOMUNUMAJ CENTROJ POR SOCIA ASISTADO

Ĉe tiaj sociasistaj instalaĵoj, la asistado al homoj kaj familioj en situacio de socia kaj/aŭ persona risko kontribuas al plifortigo de Solidara Civitaneco. En tiuj lokoj, helpataj homoj evolvas siajn kapablojn, talentojn kaj valorojn, per agadoj sociedukaj kaj por plifortigo de familiaj kaj komunumaj ligoj, krom atelieroj por Kapabligo kaj Produktiga Inkluzivado. Tiel, oni plialtigas la memestimon de tiuj homoj, kiuj do povas pli bone plenumi siajn rajtojn kaj devojn, kaj fariĝi krome agantoj por daŭripova elvolviĝo. La agado de LBV, kiu inkluzivas programojn kaj kampanjojn por mobilizado socia kaj konsciiga, celas plivalorigi la Vivon, precipe rilate infanojn kaj familiojn.

Sekve, vidu la ĉefajn agadojn:

Vivian R. Ferreira



Teresina (Brazilo)

Paulo Araújo



Maringá (Brazilo)



Manaus (Brazilo)

Vivian R. Ferreira

Arquivo BV



Montevideo (Urugvajo)

Tatiare Oliveira



Salvador (Brazilo)

Arquivo BV



Cuiabá (Brazilo)

- ▶ **INFANOJ: ESTONTECO EN ESTANTECO!**
- ▶ **JUNULOJ: ESTONTECO EN ESTANTECO!**

Partoprenas la programojn geknaboj 6- ĝis 18-jaraj, asistataj ĉe sociasistaj instalaĵoj de la Institucio, dum po kvar horoj ĉiutage. Tiu iniciato kontribuas al la valorigo de infanoj kaj junuloj, ĉar ĝi konsideras la vivhistorion kaj individuajn karakterizaĵojn de ĉiu infano kaj adoleskanto. Tiel oni starigas agadojn, kiuj helpas vekti kompetentecon kaj kapablojn, krom stimuli travivadon de valoroj de civitaneco, kulturon de paco kaj unuecon en familio.



Rio de Janeiro (Brazilo)

Nathália Valério



Fabiola Bigas

Florianópolis (Brazilo)

► **SOLIDARAJ TRAVIVAĴOJ KAJ PLENA VIVO**

Ĝi kontribuas al socikultura inkluzivado kaj plifortigado de civitaneco de adoleskantoj, junuloj, plenaĝuloj kaj maljunuloj. Ĝi proponas etoson, kiu kondukas al konstruado de ligoj interpersonaj, intergeneraciaj kaj familiaj, per agadoj en grupoj, sportumado, kulturaj aktivecoj, k.s..

EDUKADO EN AGADO ◀

Ĝi elvolvas diversajn agadojn por plenumado de la rajto je Edukado. Ĝi inkluzivas organizadon de atelieroj por kapabligo de instruistoj, kun atento pri strategioj kaj rimedoj por faciligi lernadon kaj kreadon de ligoj inter edukistoj kaj lernantoj, inkluzive kun partopreno de gepatroj en multaj tiaj agadoj.



Laila Tomín

La Paz (Bolivio)



Arkivo BV

Asunción (Paragavjo)



Arkivo BV

Buenos Aires (Argentino)



Porto Alegre (Brazilo)

Liliane Cardoso

▶ **BEBO-CIVITANO**

Kun la celo plibonigi la vivkvaliton de infanoj kaj de patrinoj, ĉi tiu programo de LBV akceptas gravedulinojn kaj virinojn kun idoj ĝis la 3-a jaraĝo. Partoprenas la agadon orientado pri la gravedeco kaj pri la sano de beboj, krom socia akompanado de familioj. Ĉi tiu agado celas ankaŭ elvolviĝon kaj ekvilibron en familiaj rilatoj.



São Gonçalo (Brazilo)

Nathalia Valério



La Paz (Bolivio)

Leilla Tonin

◀ **KAPABLIGO KAJ PRODUKTIGA INKLUZIVADO**

Ĝi preparas junulojn kaj plenaĝulojn por la labormarkato, pere de kursoj direktitaj al elvolviĝo de kompetenteco kaj teknikaj kaj personaj kapabloj.

Priscila Petreca

Poços de Caldas (Brazilo)





Porto (Portugalujo)

Arkivo BV



La Paz (Bolivio)

Arkivo BV

► **FELIÇA RIDETO**
 ► **PURAJ DENTOJ, SANAJ INFANOJ**

Per kampanjoj por prevento kaj flegado de dentoj, ambaŭ ĉi tiuj programoj alportas orientadon al malriĉaj komunumoj. Tiu agado substrekas la gravecon alpreni kutimojn, kiuj kontribuas por la sanstato de dentoj, krom kontraŭbatali la timon de multaj homoj koncerne la konsultadon al dentkuracisto. Tiaj agadoj elvolviĝas senpage ĉe infanvartejoj, lernejoj, sociaj institucioj kaj komunumoj en la urboj Lisbono, Porto kaj Coimbra, en Portugalujo kaj La Paz kaj Santa Cruz de La Sierra, en Bolivio.

SEMO DE BONA VOLO ◀

Infanoj kaj adoleskantoj 5- ĝis 12-jaraj partoprenas sociedukajn aktivecojn kaj ricevas nutran apogon. Danke al la pedagogia propono de LBV (legu pli pri tio sur p. 72), kreita de edukanto Paiva Netto, kiu kunigas “*Cerbon kaj Koron*”, la infanoj lernas pri valoroj de civitaneco, Ekumena Spiriteco kaj Kulturo de Paco.



Arkivo BV

Porto (Portugalujo)



La Paz (Bolivio)

► RONDIRADO DE KARITATO

Temas pri urĝa laboro por subteni homojn en situacio de surstrata forlasiteco. La iranta servo alportas manĝon, socian apogon kaj spiritan komfortigon. La agado klopodas ankaŭ konsciigi la civitanon pri lia propra potencialo kaj kapabloj, por ke li povu elvolvi tion kaj sekve garantii sian personan vivgajnon.

Leilla Tonin



New Jersey (Usono)

Sâmara Malaman



Porto (Portugalujo)

Arkivo BV



Coimbra (Portugalujo)



Porto (Portugalujo)

Arkivo BV

► UNU PAŜO ANTAŬEN

Centoj da familioj en situacio de socia vundebleco estas favorataj ĉiumonate de Legio de Bona Volo de Portugalujo. La Institucio laboras sur pluraj frontoj por garantii rajtojn de civitanoj, kontraŭbatali malsaton kaj situaciojn de esencaj bezonoj, kaj enkonduki socian inkluzivadon. Miloj da familioj jam kalkulas pri tia apogo. Ĉiujare, tiu agado respondecas pri disdonado de pli ol 200 tunoj da nutraĵoj, en formo de kestoj kaj pretaj manĝoj.



New Jersey (Usono)

Arkivo BV

▶ LERNANTOJ DE BONA VOLO POR PACO

Ĝi estas socieduka programo kontraŭ perforto, elvolvata en publikaj lernejoj en Usono, kun la celo starigi inter lernantoj solidaran gvidokapablon kaj kulturon de paco. Tiel, tiu iniciato orientadas infanojn kaj junulojn por agado favore al tutmonda socio pli justa, paca kaj daŭripova.



New Jersey (Usono)

Arkivo BV



New Jersey (Usono)

Arkivo BV

AGANTA BONA VOLO ◀

Ĝi proponas nutran apogadon al familioj en situacio de socia vundebleco. Per kunlaborado kun agrokultur-inĝenieroj el Ministerio de Agrokulturo kaj Bestobredado de Paragvajo, tiu programo helpas homojn, kiuj loĝas en malriĉaj lokoj, ke ili elvolu komunumajn legomĝardenojn. Krom kontentigi la lokan bezonon pri folioj kaj legomoj, tiu programo kontribuas por monenspezo, ĉar ĝenerale produktiĝas plia kvanto, kiun oni povas vendi.

Krome, oni ĉiumonate transdonas kestojn enhavantajn aldonajn nutraĵojn, favore al la nutra stato de familioj.



Cerro Poty (Paragvajo)

Allison Bello



Xerém, Duque de Caxias (Brazilo)

Nathália Valério



Xerém, Duque de Caxias (Brazilo)

Nathália Valério



KAMPANJOJ

► SOS KATASTROFOJ

Kunlabore kun la Civila Defendservo kaj aliaj registaraj institucioj, krom privata iniciato, tiu kampanjo kalkulas je la apogado de volontuloj. Ĝi entreprenas urĝajn agadojn por flegi homojn kaj/aŭ komunumojn atingitajn de katastrofoj. Ĝi transdonas varojn tuj bezonatajn (tuj manĝeblajn nutraĵojn, trinkeblan akvon, vestojn, ŝuojn, k.t.p.), materialon por persona higieno kaj purigado de la ejo kaj matracojn, krom urĝa sanflegado.



Itaoca (Brazilo)

Felipe Torrin



New Jersey (Usono)

Arkivo BV



Vivian R. Ferreira

São Paulo (Brazilo)



José Gonçalo

Brasília (Brazilo)



INFANO NOTO 10 — PROTEKTI INFANOJN ESTAS KREDO PRI LA ESTONTECO!

Ĉi tiu kampanjo ekonomie bonfaras al gepatroj, kiuj ne disponas pri rimedoj por aĉeti lernejomaterialon. Komence de studojaroj, oni transdonas pli ol 14 mil ensemblojn de pedagogia kaj lerneja materialoj al infanoj kaj adoleskantoj, kiuj frekventas la lernejojn de la Instituto kaj al tiuj asistataj per la programoj *Infanoj: Estonteco en Estanteco!* kaj *Junuloj: Estonteco en Estanteco!*. Rezultas de tio pli alta memestimo flanke de la infanaro, krom stimulo al plua studado.



Verônica Alexandre

Maceió (Brazilo)



Vânia Bandeira

Aracaju (Brazilo)

LBV EN LA MONDO

KONSTANTA KRISTNASKO DE LBV — JESUO, NIA ĈIUTAGA PANO!

Ĝi transdonas nutraĵojn al familioj asistataj dum la tuta jaro, fare de sociasistaj programoj de LBV, al tiuj asistataj de institucioj, kiuj partoprenas Reton Solidara Socio kaj al tiuj subtenataj de organizoj, kiuj kunlaboras kun la Instituto.



Andrea Varela

La Paz (Bolivio)



Vivian R. Ferreira

Guarulhos (Brazilo)



Tatiane Oliveira

Aracaju (Brazilo)



Jean Carlos

Natal (Brazilo)



Archivo BV

Asunción (Paragvajo)



Gabriel Lucas

Boa Vista (Brazilo)



Belo Horizonte (Brazil)

Edison Geraldo



Curitiba (Brazil)

Tatiane Oliveira

Vinicius Ramão



Jean Carlos



João Pessoa (Brazil)



Salvador (Brazil)

■.....Scienca produktado.....■ kaj daŭripova elvolviĝo

El la Redaktejo



La graveco de scienca kaj teknologia produktado por homa elvolviĝo estas pli kaj pli granda. Krom serĉado de klarigoj pri la naturfenomenoj, scienco alfrontas la defion konfirmi sian valoron kaj influpovon, precipe ĉe malpliigo de sociaj malegalecoj. Por tio, ĝi devas starigi teknologiajn perilojn kapablajn kontentigi bezonojn kaj dezirojn de la moderna socio. La bonfaroj de tia kontribuo estas evidentaj, ekzemple ĉe la progresoj en aviado, en robotoj, en komunikado, en farmacia industrio, en mikroelektroniko kaj informadiko, en elvolvado de novaj fontoj de energio kaj aliaj. Tia klopodado mobilizas laboratoriojn, esploragentejojn kaj universitatajn centrojn tra la tuta mondo.

Ekde la jaro 2009, Brazilo okupas la 13-an pozicion en la kadro de tutmonda produktado de scienco, kiu kalkulas la kvanton da akademiaj laboraĵoj prezentitaj en fakaj publikaĵoj. Laŭ analizistoj, la lokon de la lando en tiu listo kaŭzas precipe la disvastigado de edukado kaj la pliiĝo de la kvanto da federaciaj universitatoj kaj esploristoj.

Por investi je kvalito kaj je pli ampleksa atingebleco de tiuj laboraĵoj, Legio de Bona Volo opinias, ke necesas enkonduki jam en la unuagradan edukadon la analizokapablon kaj konscion pri la rolo de scienco en ĉies vivo. Rilate al tio, LBV stimulas la esencan gravecon de infanoj, tio estas, ke infanoj lernu, ke ili okupas lokon en la socia medio, kie ili vivas, kaj sciu, ke ili povas influi por plibonigi sian medion.

En la ses etapoj, kiuj konsistigas MAPREI (Lernometodo por Lernado per



Fotoj: Vivian R. Ferreira



Felipe Tonini



Lernantoj de Instituto por Edukado José de Paiva Netto, en São Paulo, Brazilo, utiligas laboratoriojn pri sciencoj en tiu lerneja instalaĵo por eksperimentoj.

Racia, Emocia kaj Intuicia Esplorado), nome metodologio propra al Pedagogio de Amo kaj Pedagogio de Ekumena Civitano (legu pli sur p. 72), la centra atento sidas sur **esplorado** kaj **intuicio**. Lernantoj elvolvas kapablecojn esplorajn, raciajn kaj intuiciajn, tiel ke ili estas ne nur ricevantoj de konoj, sed ankaŭ centraj figuroj en la lernoproceso.



Gisele Batista

INTERŜANĜI AGADON KUN LA NATURMEDIO

En Rio de Janeiro, Brazilo, lernantoj en Eduk-Centro de LBV vizitis, en aprilo 2013, Nacian Parkon en Tijuca, kie troviĝas la plej granda heterogena urba arbaro en la mondo, plantita de homoj. Tiu ekskurso estis parto de aktivecoj inter lernobjektoj de tiu lernejo de LBV. *“Ni montris temojn komunajn inter lernobjektoj Biologio kaj Geografio. La gelnantoj observis aspektojn de la lokaj faŭno kaj flaŭro, la karakterizaĵojn de la arbara grundo kaj iom ekkomprenis la rilatojn inter vivantaj estuloj en naturaj medioj”*, raportis instruisto pri Biologio **Felipe Barbosa**.



Persona Arkivo

Amazonida idealo

Tiu koncepto de LBV pri Senlima Ekumenismo kaj Edukado malfermita al Paco estas parto de persona kaj profesia vivovojo de geologiisto **Daniel Borges Nava**, ŝtat-sekretario pri Mineraloj, Geologia Diverseco kaj Akvorimedoj en Amazona Ŝtato, Brazilo. Magistro pri Naturmediaj Sciencoj kaj Daŭripoveco en Amazonio, li rakontas, ke de sia infanaĝo li atentis pri zorgemo koncerne la naturmedion kaj pri sociaj pledoj. *“Plej granda heredaĵo lasita de miaj gepatroj estas tiu ekumena edukado de LBV, ekde miaj unuaj paŝoj.”*

Nava naskiĝis en Rio, kaj alprenis amazonidan identecon, post kiam li lernis ami kaj respekti tiun regionon. *“Estas granda privilegio labori volontule ĉe Legio de Bona Volo, kaj kontribui per temoj kiel daŭripoveco, naturmedio, civitaneco, edukado, Ekumena Spiriteco, ĉiam kun la fokuso je problemoj kaj defioj en Amazonio, kie mi vivas ekde la jaro 1994”*, li diris.

“Estas granda privilegio labori volontule ĉe Legio de Bona Volo, kaj kontribui per temoj kiel daŭripoveco, naturmedio, civitaneco, edukado, Ekumena Spiriteco, ĉiam kun la fokuso je problemoj kaj defioj en Amazonio, kie mi vivas ekde la jaro 1994.”

Daniel Borges Nava

Ŝtat-sekretario pri Mineraloj, Geologia Diverseco kaj Akvorimedoj en Amazona Ŝtato.

LUDI SCIENCISTON

Geknaboj, kiuj partoprenis la programon *Infanoj: Estonteco en Estonteco!*, en la urbo Ipatinga, lernas pri praktikado de scienco, per rilatigado de sciencaj konceptoj al la ĉiutaga vivo. La ateliero klopodas vekoj en infanoj la plezuron de esplorado, per aktivecoj percepto-movaj, lingvaj kaj kognaj, per diversaj sentumomanieroj. En unu el la proponitaj eksperimentoj (foto), la infanoj miris pri balono, kiu pleniĝas per si mem. Ĉiuj lernis, ke acetata acido (vinagro) ĥemie reagas kun natria bikarbonato en plasta botelo, kaj sekve liberigas karbondioksidon. Laŭgrade kiel formiĝas pli da gaso, la premo en la ujo kreskas kaj la balono pleniĝas.

Alicia Santos



Kiel ŝtat-sekretario kaj profesoro, li asertas, ke esence grava por lia formiĝo estis la sperto partopreni en kampanjoj kaj edukaj projektoj de LBV, krom akompani la “*vastan literaturon de Bona Volo*”.

Laŭ Nava, tiu aro da valoroj kaj la solidara laboro plifortigis lian kompromisemon rilate kolektivan bonfarton. “*La projektoj kaj agadoj, kiujn ni prilaboras en Amazonio ĉiam baziĝas sur dimensioj de daŭripoveco naturmedia, socia, ekonomia, politika, kultura, spirita kaj eduka, kaj ili kuniĝas kun la ok Jarmilaj Evoluigaj Celoj. Ĉi tiu aparta defio en nia regiono kontrastas kun la ĉeesto de grandegaj naturaj riĉaĵoj, kiujn oni devas konservi, kaj kun indikoj ankoraŭ neakcepteblaj pri nesufiĉa homa elvolviĝo en la komunumoj.*”

Koncerne tiajn cirkonstancojn, li substrekas la bezonon alĝustigi la vojojn, por ke tradiciaj kaj indianaj loĝantaroj ne plu submetiĝu al neglektemo kaŭzata de koncentrigaj

São Paulo (Brazilo)



Foto: Vivian R. Ferreira



“LBV zorgas pri nia estonteco. Oni lernas, ke naturmedio estas grava, ke Naturo influas [nian vivon]; sekve, oni plantas arbojn, partoprenas eventojn kiel Foiro de Novaĵoj... Plej multaj lernejoj faras, ke oni nur ĉeestu lecionojn, tion mi povis vidi laŭ miaj kolegoj en la fakultato. Tia apartaĵo de LBV estis tre grava por mi.”

Daiana Evaristo de Oliveira

Biologiisto kaj ekslernantino en Eduk-Ensemblo Bona Volo, en ĉefurbo São Paulo, Brazilo.



POÇOS DE CALDAS (BRAZILIO)

En Komunuma Centro por Sociasistado de LBV, asistatataj infanoj plenumis en aprilo kaj majo 2013 serion da aktivecoj kun fokuso je la temo pri naturmedia konservado. Filmoj, promenoj al parkoj, plantado de plantidoj kaj farado de libroj, recikleblaj sakoj kaj aŝiŝoj (1) entuziasmigis la infanojn. (2) Kiam infanoj vizitis Naturmedian Parkon Poços de Caldas, kreitan de la entrepreno Alcoa Alumínio, ili sufiĉe lernis pri faŭno kaj flaŭro de tiu regiono.

ekonomiaj aktivecoj, “*kies eksteraj aspektoj fine konsideras havigatajn riĉaĵojn kiel produktaĵon aŭ kompenŝaĵon, ne kiel rimedon por daŭripova vivrimedo en tiuj komunumoj, per efektiva politiko de elvolviĝo kun socia respondeco.*” Kaj Daniel Nava kompletigis: “*En Amazonio, tio certe implicos bezonon konstrui ian por-indianan politikon, kiu transformu la Brazilan Ŝtaton de protektanto al instiganto de indiana entreprenemo, kapabla prizorgi arbarojn, akvorimedojn, faŭnon, mineralaĵojn kaj produkti novajn konojn pri daŭripoveco, kio estas paradigmo dum ĉi tiu 21-jarcento.*”

Celoj en la Jarmilo kaj akademieca elekto

Ekslernantino en Eduk-Ensemblo Bona Volo, en ĉefurbo São Paulo, Brazilo, biologiisto **Daiana Evaristo de Oliveira** klare konscias pri la graveco, ke lernejo prilaboru la lernejajn lernobjektojn praktike kaj objekte, por ke edukatoj povu percepti la aplikeblecon de tiuj konoj en la ĉiutaga vivo. “*LBV zorgas pri nia estonteco. Oni lernas, ke naturmedio estas grava, ke Naturo influas [nian vivon]; sekve, oni plantas arbojn, partoprenas eventojn kiel Foiro de Novaĵoj... Plej multaj lernejoj faras, ke oni nur ĉeestu lecionojn, tion mi povis vidi laŭ miaj kolegoj en la fakultato. Tia apartaĵo de LBV estis tre grava por mi*”, ŝi emfazis.

Partopreno en la 1-a Foiro de Novaĵoj Reto Solidara Socio, apoge al Jara Ministeria Revizio de Ekonomia kaj Socia Konsilantaro de UN (Ekosok), en la jaro 2007, estis la impulso, kiun Daiana bezonis por elekti sian profesionan karieron. “*Mi partoprenis en*

laboro por la Foiro de Novaĵoj ĉi tie en mia lernejo kaj ĉiu mezlerneja klaso devis prilabori unu el la ok Jarmilaj Evoluigaj Celoj. Kaj tiujare aperis diskuto pri tutmonda varmiĝo; tiam mi interesiĝis pri la afero de naturmedio”, la junulino diris, kaj post tiu sperto en la lernejo ŝi decidis frekventi la kurson pri Biologiaj Sciencoj.

Dum lernado pri vivantaj organismoj kaj iliaj rilatoj kun la medio, Daiana tuj interesiĝis pri studado pri flaŭro. En sia kursofina eseo, ŝi esploris la influon de atmosfera malpureco en plantojn, kiu poste povos utili por esploroj en la kampo de homa sano, koncerne spirmalsanojn kaj aliajn malsanojn pligravigatajn de klimataj ŝanĝoj.

Tiu studaĵo, laŭ la biologiisto, emfazas ankaŭ la konsciigon, ke necesas konservi la plantojn. *“La homoj ankoraŭ ne havas tian edukitecon, sekve ili faligadas arbojn por konstruigi pli da domoj. (...) Tiu eseo taŭgas ankaŭ kiel bazo por aliaj studoj, kiuj analizas la homan sanon, ĉar toksaj kvantoj por vegetaĵoj estas pli altaj ol tiuj, kiujn homoj eltenas. Sekve, se ili malbonfaras al planto, al homo la situacio estas eĉ pli malbona”*, ŝi klarigis.

Post sia diplomiĝo, Daiana revenis al Instituto por Edukado José de Paiva Netto, nun por labori kiel didaktika gvidanto. Samtempe kiam ŝi instruas infanojn kaj adoleskantojn, ke ili respektu la Naturon, ŝi planas plenumi novajn esplorojn, sed kun atento al reviviĝo de la naturmedio. *“Ni plej multe bezonas nuntempe prizorgi la naturmedion, por plibonigi la sanon de la loĝantaro, (...) de la faŭno, de la flaŭro...”*, ŝi emfazis. ■



São Paulo (Brazilo)

“Mi venis en Instituton por Edukado José de Paiva Netto kiam mi estis 12-jara kaj eliris, kiam mi finis la mezlernejan periodon. Tiu lernejo estis esence grava por mia eniro en Universitaton de São Paulo. Tie mi lernis valorojn, kiuj formas la karakteron. Krom multe da studado, volforto kaj bona karaktero estas nemalhaveblaj por sukceso dum la penado al abiturienta ekzameno. (...) La apogon de instruistoj kaj de homoj, kiuj helpis min ĉe la Instituto, mi ne trovas aliloke. Libroj kaj informoj, al kiuj mi povis aliri kiam mi estis infano helpis min elekti la kampon de Fiziko, sed la apogado de edukistoj estis esence grava. Ĉe Universitato de São Paulo, mi partoprenis diversajn esplorojn, en projekto pri sciencodisvastigado en la kampo de likvaj kristaloj por mezgrada lernejo kaj mi partoprenis ankaŭ Spektaklon pri Fiziko.”



School Picture

Adamor Luiz Eleiel Virgino, 23-jara

Magistra diplomiĝanto en nanoteknologio aplikita al biologiaj komponaĵoj ĉe Universitato de São Paulo.

Sciencaj

kaj sociaj novaĵoj

Universitata edukado por produktado de konoj,
socia inkluzivado kaj daŭripova elvolviĝo.

João Grandino Rodas



João Grandino Rodas estas rektoro de Universitato de São Paulo (USP) kaj havas kvar universitatajn diplomojn: Muziko, el Fakultato de Muziko Sankta Koro de Jesuo (1964); Edukado, el Fakultato de Filozofio, Sciencoj kaj Beletro de USP (1969); Juro, el Fakultato de Juro de USP (1969); kaj Beletro el Fakultato de Filozofio Nia Sinjorino Intermedia de Jezuitaj Pastroj (1970). Li estas magistro pri Ekonomi-Politikaj Sciencoj el Fakultato de Juro de Universitato de Coimbra (1970); pri Juro, el Harvard Law School (1978); kaj pri Diplomatio, el Fletcher School of Law and Diplomacy (1985). Doktoro pri Juro (1973), asistanta profesoro (1976) kaj ĉefprofesoro pri Internacia Juro (1993), en Fakultato de Juro de USP. Prezidanto de Interamerika Jur-Komisiono de Organizo de Amerikaj Ŝtatoj (2000-2002), de la Konstanta Tribunalo por Reviziado de Merkosudo (2007-2008) de Administra Konsilantaro por Ekonomia Defendo – CADE (2000-2004).

Nuntempe, scienco ne trapasas senskue tra soci-politik-ekonomiaj tutmondaj transformiĝoj, kaj ĝi devas “rekrei” sin mem por daŭre okupi elstaran rolon al ĝi destinitan de la socioj dum la lastaj 300 jaroj. Paradoxse, tia rekreado dependas egale de la kapablo plu antaŭeniri, kun la celo konservi siajn karakterizaĵojn de alta kvalito kaj produktanto de konoj, same kiel de transformiĝemo, por adaptiĝi al novaj postuloj de la socioj, de kulturo kaj de scienco.

Tiu moviĝo tamen starigas respondecon flanke de universitatoj, koncerne formadon de profesiuloj kaj sciencistoj en kondiĉoj postulataj de la socioj, kiuj klopodas strukturiĝi ĉirkaŭ solidaj konoj, kiuj celas navigadon, transformadon de la medio kaj konstruadon de socia justeco.

Ĉi tiu lasta aspekto estas ŝlosila rilate diskutadon pri la rolo de produktado de konoj en universitata medio, serĉe de socia inkluzivigo kaj daŭripova elvolviĝo. Por tio, estas grave, ke ni memoru la idealon de “egaleco” de la Franca Revolucio, kaj ĝian influon je universitata edukado.

La hispano **José Manuel Esteve**, en sia verko *La Tria Eduka Revolucio*

(2004), montras, ke en la 19-a jarcento ekaperis ideoj pri edukado por ĉiuj homoj. Pro tio, ekde la dua duono de la 20-a jarcento, solidiĝis tio, kion la aŭtoro nomas “tria eduka revolucio”, pro elĉerpiĝo de eduksistemoj bazitaj sur ekskludado de plej granda parto de la loĝantaro; kaj la apero de tiu ideo plifortiĝas kun la impulso enlernigi 100% el infanoj kaj junuloj, ne nur je unuagrada instruado, sed, kiel nuntempe, je mezgrada instruado, kaj tio jam atingas la universitatojn. Tia serĉado de universaligo de instruado estas klare ligita al proceso de solidigo de moderna koncepto pri demokratio en okcidentaj nacioj, kaj ĝia elvolviĝo ne okazas sen streĉaj situacioj.

Demokratigo kaj serĉado de universaligo de instruado alportis diversecon en la universitatojn kaj novaj popolamasoj ne tre alkitimitaj al la kampo de supera edukado ekpartoprenis tiun ĉiutagan vivon. Mi aludas al alirebleco al edukado ne nur flanke de virinoj aŭ de infanoj devenintaj el sociekonomiaj tavoloj malpli bonhavaj kaj de etno-sociaj minoritatoj, sed de eĉ pli vasta diverseco, kiu rompas la homogenecon, kiu regis pasinteco.

.....

Demokratigo kaj serĉado de universaligo de instruado alportis diversecon en la universitatojn kaj novaj popolamasoj ne tre alkutimitaj al la kampo de supera edukado ekpartoprenis tiun ĉiutagan vivon.

Tia universaligo rompis la homogenecon kaj la elitecon de edukado, kiam ĝi enkondukis interagadon inter individuoj havantaj malsamecojn sociajn, ekonomiajn, psikajn, korpajn, kulturajn, religiajn, etnajn, ideologiajn, seksan kaj de seksa orientiĝo.

Diverseco kaj demokratio, do, kune iras por konkeri ĵusajn progresojn en produktado kaj disvastigado de konoj. Tia socipolitika nuntempa sistemo kondukas edukinstituciojn al respektado pri malsamecoj en siaj spacoj kaj al kunvivado kun tio. Tiu modelo limigas la inklinojn al ekskludado aŭ malvalorigado de alia pensmaniero. Ĝi ankaŭ solidigas egalecon de rajtoj kaj devoj kaj garantias spacon por kunvivado inter malsamuloj, kaj tiel riĉigas la tutmondan kulturon, produktante antaŭeniradon kaj sciencan, socian novigadon.

Integrado de tiuj novaj lernantoj kaj lernantinoj en la klasojn, kaj multaj el ili estas filoj kaj filinoj de gepatroj nelernintaj, kaj sekve reprezentantoj de ia unua generacio kun alirebleco al lernejoj, jen urĝigas, ke

oni pensu pri novaj manieroj koncepti edukadon. Serĉado pri egaleco de kondiĉoj kaj pri rajto je inkluziviĝo, flanke de ĉiuj homoj en la eduka sistemo, estas nova fenomeno laŭ historia vidpunkto, kune kun strukturaj ŝanĝoj je la funkcio de la konoj en la nuna mondo kaj kun la aktuala sociekonomia organizo de post-industriaj socioj, determinas fortan diskutadon pri la rolo de edukado.

Inter la defioj de universitatoj en la 21-a jarcento, estas la temo pri daŭripova elvolviĝo, kaj la kontribuoj esperataj de tiuj institucioj mezuriĝas en la kadro de altnivelaj esploroj, altkvalita instruado, same kiel en la rolo de gvidkapablo koncerne diskutojn, kiuj direktas publikajn politikojn kaj investojn. Esploroj en la kampo de la tri subkomprenataj dimensioj en la koncepto pri daŭripova elvolviĝo, nome, la naturmedia, la ekonomia kaj la socia, produktas konojn, kiuj permesas pli bone kompreni nian realecon kaj precipe havigi rimedojn por starigi novan specon de rilatoj inter la socio kaj la Naturo. Tia paradigmon oni enmetas en la proceson de formado de novaj profesiuloj en diversaj kampoj, tiel ke estiĝas laŭgrada akceptado de ideoj pri daŭripoveco en la vivo de la kolektivo.

Tiuj celoj kongruas kun kelkaj el la celoj firmigitaj en la fina raporto de Monda Konferenco pri Supera Instruado — World Conference on Higher Education —, kiun aŭspiciis Organizo de Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo (Unesko), en **Parizo**, Francujo, en julio 2009:

“a. Pro la komplekseco de la mondaj defioj en la nuntempo kaj en



Diskonigo

Universitato de São Paulo (USP) — la plej granda institucio por supera instruado en Latinameriko — staras inter la plej bonaj en la mondo.

estonteco, supera instruado havas la socian respondecon antaŭenigi nian komprenpovon pri multflankaj problemoj, kiel la sociaj, ekonomiaj, sciencaj kaj kulturaj, same kiel nian kapablon aliri ilin. Supera instruado devas plenumi rolon de gvidanto en socia konstruado de tutmonda kono, por ke oni alfrontu tutmondajn defiojn, inkluzive de nutra sekureco, klimataj ŝanĝoj, administrado de akvo, interkultura dialogado, renovigeblaj energioj kaj publika sano.

“b. Institucioj por supera instruado, en la praktikado de siaj bazaj funkcioj (esplorado, instruado kaj servado al la komunumo), en kunteksto de institucia aŭtonomio kaj akademia libereco, devos koncentriĝi je agado por intersciencumado kaj aŭspiciado de kritika penskapablo kaj de aktiva civitaneco, do kontribuante por daŭripova elvolviĝo, por paco kaj por bonfarto, kaj krome por la

plenumado de homaj rajtoj, interalie egaleco inter seksoj.

“c. Supera instruado ne nur devas liveri solidajn kompetentulojn por la nuna kaj estonta mondoj, sed ankaŭ kontribui por formado de civitanoj kun etikaj principoj, engaĝitaj en konstruado de paco, de homaj rajtoj kaj de demokratiaj valoroj.”

Resume, nuntempaj ŝanĝoj en la tuta mondo atribuas novajn respondecojn al universitatoj. De nun, ili devas formi profesiulojn kaj sciencistojn, kiuj devas koncepti, produkti kaj disvastigi konojn ĉirkaŭ principoj kiel navigado, transformado de la reala medio kaj konstruado de socia justeco kaj de daŭripova elvolviĝo. Se tio estas vera rilate al universitatoj ĝenerale, des pli vera ĝi estas rilate publikajn universitatojn, kiujn subtenas impostoj, pezantaj pli forte sur homoj ekonomie malpli havaj. ■

Cifereca inkluzivigo kaj labormerkato

La defio universaligi alireblecon
al novaj teknologiaĵoj

Leila Marco



I TEKNOLOGIO



Leila Tonin

CACHOEIRO DE ITAPEMIRIM (BRAZILIO)



TERESINA (BRAZILIO)



POÇOS DE CALDAS (BRAZILIO)

Priscila Petreca



LONDRINA (BRAZILIO)

Juliana Bortolin

LBV laboras por cifereca inkluzivado per subtenado de laboratorioj pri informadiko en granda parto de siaj lernejoj kaj Komunumaj Centroj por Socia Asistado.

Kiel eble plej multe profiti tion, kion povas proponi la novaj teknologioj, kongruigante ilin kun la eksponenciala pligrandiĝo de informoj, jen tio montriĝas ĉiutage pli bezonata. Ĝis la komenco de la jaroj post 1990, konoj kaj utiligado de retoj de komputiloj en la mondo limiĝis al scienca kaj akademia komunumo. Interreto, kiel ni nuntempe konas ĝin, aperis post la kreado de World Wide Web (www), en la jaro 1990, fare de komputosciencisto **Timothy John Berners-Lee**, en Eŭropa Konsilantaro por Nukleo-Esploroj (CERN).

Malgraŭ ke interreto estas granda faciligilo koncerne taskojn kaj grava rimedo por la eduka procezo, la interreto kaj siaj periloj ankoraŭ ne estas haveblaj al ĉiuj, kaj tio influas la proceson de socia inkluzivado kaj alireblecon de homoj al pli bonaj ŝancoj en la labormerkato. Asertas profesoro **Nelson de Luca Pretto**, aŭtoro de la verko *Lernejo kun/sen estonteco: Edukado kaj multmediiloj* (1996), ke, “estontece, analfabeto estos individuo, kiu ne scipovos



Vivian R. Ferreira



João Pineda

TAGUATINGA (BRAZILIO)

deĉifri la novan lingvon produktatan per amaskomunikiloj”.

Por ĝeneraligi la uzadon de Teknologiaĵoj por Informado kaj Komunikado (TIK), nome por kontribui por plibonigi vivkondiĉojn de la loĝantaro, landoj ĝenerale alfrontas seriozajn barojn, inkluzive de fortiĝantaj landoj, kiel Brazilo.

En majo 2012, Fondaĵo Getulio Vargas (FGV) informis, per sia esploro pri la nova Mapo de Cifereca Inkluzivado, ellaborita kunlabore kun Fondaĵo Telefônica/Vivo, ke la brazila ekonomio, kiu estas la sepa plej forta en la mondo, ankoraŭ vivas iaspecan “cifereca *apartheid*”.

Laŭ tiu studaĵo, kunordigita de ekonomikisto **Marcelo Neri**, tiutempe estro de Centro de Sociaj Politiko de FGV kaj nuntempe anstataŭanta ĉefministro de Sekretario de Strategiaj Aferoj (SAE), unu triono el la loĝantaro disponas pri aliro al interreto hejme; kaj el po 100 brazilanoj pli ol 10-jaraĝaj, 65 respondis, ke ili ne konas la reton. Unu plia informo estas atentoveka: la koncentriĝo de ciferecaj aparatoj ĉe klaso A – el po 10 hejmoj kun

Teknologio pri alfabetigo — En la urbo Taguatinga, instruistoj de LBV utiligas kiel pedagogian rimedon komputilan projekciilon (*data show*) por prepari la proceson de antaŭlerneja alfabetigo.

“Mi estis tre malĝoja, deprimita, mi emis restadi surlite, en la dormoĉambro. Post kiam mi venis en LBV, mi fariĝis alia homo. Mi sentas min kontenta, mi renaskiĝis.”



Leandro R. Nunes

Francisca Gregório

68-jara, asistata per programo *Spaco por Kunvivo*, de LBV, en Fortaleza (Brazilo).

komputilo kaj alirebleco, 7 apartenas al la plej riĉaj. Tio montras, ke ankoraŭ multon oni devas fari por alĝustigi malegalecon je alirpovo al TIK.

Legio de Bona Volo helpas malpliigi tiun distancon, laborante por cifereca inkluzivado kaj por pli bonaj vivkondiĉoj de familioj kun malalta enspezo. Pro tio, de pli ol unu jardeko ĝi funkciigas infor-



SALVADOR (BRAZILIO)

madikolaboratoriojn, en granda parto de siaj lernejoj kaj Komunumaj Centroj por Socia Asistado. Nur en la jaro 2012, ĝi okazigis tiukampe pli ol 93 mil asistojn, bonfare al infanoj, junuloj (kiuj serĉas sian unuan laborlokon), plenaĝuloj (por profesia relokiĝo) kaj maljunuloj.

Fokuso je Nordo kaj Nordoriento de Brazilo

Mapo de Cifereca Inkluzivado indikis malegalecon en ĉiuj kvin brazilaj regionoj, kun tabeloj de alirebleco dividitaj je du tre disaj partoj. La dek unuajn lokojn okupas Sudaj, Sudorientaj kaj Centrokcidentaj Ŝtatoj; sur la dua parto koncentriĝas reprezentantoj el la Norda kaj Nordorienta Regionoj.

En tiuj du regionoj, LBV intense laboras por malpliigi la mankon de ciferecaj eblecoj, kun emfazo je asistado en urboj **Aracaju, Salvador, Recife, Teresina, Itabuna, Fortaleza, São Luis kaj Belém.**

La agado en laboratorio de informadi-

ko en tiu Instituto partoprenas la laboron de programo *Kapablo kaj Produktiva Inkluzivado*, kiu proponas senpagajn kursojn por evoluigo de bezonataj kapabloj por pli bona profesia lokiĝo aŭ por ke la asistato fariĝu entreprenisto. Tiu iniciato favoras ankaŭ komunuman kunvivadon kaj valorojn de civitaneco.

En lecionoj pri informadiko, partoprenantoj lernas utiligi komputilajn rimedojn (teksto-prilaborilon kaj elektronikan tabelaron), programojn por krosado en interreto kaj prilaboril-programon de komputiloj. La precipa celo estas proponi ciferecan kapabligon al junuloj kaj al tiuj, kiuj troviĝas ekster la labormondo, kiu pli kaj pli postulas de laboristoj tiajn konojn. La lernantoj krome ricevas orientadon por kunmeti kaj formatigi sian propran profesian vivpriskribon.

Enkondukado en la labormerkaton

En la ĉefurbo de ŝtato Pernambuco, **Victorio Drumond de Farias**, 21-jara, estas unu el la multaj junuloj, kiuj serĉas apogon de Legio Bona Volo. Deveninte el simpla familio en la urbo Recife, li ne havis rimedojn por pagi kurson kaj trovis ĉe LBV vojon por kreski. Krom lerni uzi ciferecajn perilojn nuntempe postulatajn, Victorio elstarigis aliajn bonfarojn en la kurso: *“Oni donis multajn tekstojn por ke ni legu kaj ciferecigu, kaj tio pliriĉigis niajn konojn pri la portugala lingvo. Ni ĉiutage preĝis, tio estis al mi bonfara kaj mi opinias, ke ankaŭ por aliaj personoj; la grupo estis tre unueca pro tio”*.

Laŭ tiu junulo, la granda kvanto da legaĵoj kaj la kvalito de la tekstoj estis decidaj por ke li lernu pli bone sin esprimi okaze de intervjuoj por akiri laboron. Antaŭ nelonge li partoprenis konkuron kune kun 100 kandidatoj, kaj estis elektita kiel unu el

la 25 plej bone preparitaj. La bona rezulto donis al li profesian laborlokon, krom la instigo por serĉado de novaj aspiroj.

Sen aĝolimo

Por ĝui la bonfaron alportitan de la uzado de novaj teknologiaĵoj, multaj maljunuloj klopodas eniri la ciferecan mondon. Ili deziras senti sin aktivaj kaj aktualaj, kongrue kun la vivstilo de la familio kaj de la socio. Por tio, ili devas superi eventualan malfacilecon pri parkerado kaj manipulado de komputilo, ekzemple, krom la limigita alirebleco al la mondo de informadiko.

Franisca Gregório, 68-jara, loĝanta en la ĉefurbo de la brazila ŝtato Ceará, trovis malfacile uzi eĉ elektronikajn kasojn en banko kaj krome suferis pro malfacila psikosocia situacio, inkluzive kun malalta memestimo kaj senmotivigo. Ĉe Komunuma Centro por Socia Asistado de Legio de Bona Volo, en la urbo Fortaleza, ŝi trovis la bezonatan apogon en la programo *Spaco por Kunvivado*.

Danke al tia solidara agado, ŝi povis transpasi barojn. *“Pro mia aĝo, mi hontis eniri kurson pri komputiloj. Tiam, ĉi tiea instruisto diris, ke tio ne estas problemo.”* Laŭ la daŭro de la kurso, s-ino Francisca celebras: *“Tio estas venko, mi jam scipovas fari mul-ton... malfermi notkajeron, enveni en Facebook kaj esplorserĉi per interreto, kaj mi antaŭe ne scipovis eĉ ŝalti komputilon.”*

La propono de la Institucio intimigi maljunulojn al la cifereca medio reprezentas manieron kontribui, por ke homoj en la Tria Aĝo havu flanke de pli junaj homoj ŝancojn por evoluo. Tio signifas, laŭ la vortoj de la direktoro-prezidanto de LBV, José de Paiva Netto, *“kunigi la spertoriĉaĵojn de maljunaj homoj al la fekunda energio de la junaj.”* ■

SUPERADO KAJ SOLIDARECO

Cifereca civitaneco

Junulo revenas al LBV por redoniti, kion li lernis

Komunuma Centro por Socia Asistado de Legio de Bona Volo en **Itabuna**, en la interna parto de ŝtato Bahia, Brazilo, estas tipa ekzemplo pri la alta kvalito rilate al cifereca kapablo. Krom tiu servo, estas ankaŭ la zorgemo aldoni informojn kaj sciigojn, kio faris, ke LBV starigi gravajn kunlaboradojn, unu el ili kun “AdmTecno Júnior Consultoria e Projetos”, entrepreno formita kaj administrata de lernantoj de kursoj pri Administrado, Informosistemoj kaj Psikologio en Fakultato pri Teknologio kaj Sciencoj (FTC) en Itabuna.

Danke al tia apogo, serio da prelegoj, ekde la dua semestro de 2012, kunigas volontulajn invititojn en tiu lernejo. En novembro 2012, sub la gvidado de edukistino **Eliane Marinho**, la diplomiĝanto pri Administrado **Hayan Carlson**, prelegis pri la temo “Profesia evolviĝo”. Komence, Hayan prezentis al la asistatoj de LBV panoramon pri la labormerkato, emfazante la kapablecon. Poste, la preleganto klarigis la funkciadon de entreprenoj. La kunsido vekis grandan intereson ĉe la partoprenantoj. Laŭ la universitatano, tia iniciato en la Institucio malfermas pordojn de scio al multaj junuloj. Li menciis sian propran ekzemplon: *“Antaŭ 13 jaroj la kurso pri informadiko de LBV multe helpis min je mia profesia kariero, min apogis, kaj [la Institucio] plu faradas tiun belegan laboron favore al aliaj homoj. La hodiaŭa sperto estis kontentiga, multaj homoj eliris kun la percepto, ke ili povas realigi siajn revojn. Mi dankas al LBV por la okazo povi kundividi iom de mia scio... mi estas feliĉa”.*



Persona Arkivo



LA PAZ/BOLIVIO

Foto: Andre Valera

Sociaj teknologioj kaj daŭripoveco

La asistoreto de Legio de Bona Volo de Bolivio ĉiutage favoras milojn da homoj en Brazilo kaj en pliaj ses landoj, kie ĝi posedas memstarajn bazojn. Ili estas proksimume 100 propraj ejoj, lokitaj en Sudameriko kaj Nordameriko kaj en Eŭropo. En tiuj ejoj oni aplikas modernajn sociajn teknologiaĵojn

en laboro eduka kaj socialista de tiu Instituto. Tiu perilo inkluzivas teknikojn kaj metodojn reaplikeblajn, kiuj konsistigas bonajn praktikojn, respondecajn pri liverado al la komunumo de eblecoj transformi ilian realaĵon.

Por elvolvi programojn kaj projektojn por

LA PAZ/BOLIVIO



socia inkluzivado, kiuj kontribuu por daŭripova elvolviĝo, LBV starigas kunlaboron kun agantoj en la kampoj de tekniko-scienco, prizorgado de nutraj bezonoj, edukado, monenspezado, sano kaj naturmedio.

LBV ĉeestas la bolivian Altebenajn

Ekde la jaro 1986, Legio de Bona Volo funkciigas en la ĉefurbo **La Paz** gravajn sociasistajn programojn kaj infanĝardenon Jesuo, kie oni akceptas infanojn 2-jarajn ĝis 5-jaraj, kiuj apartenas al familioj en situacio de vundebleco.

Du el tiuj programoj — *Edukado en Agado* kaj *Puraj dentoj, sanaj infanoj* — estas ekzemploj pri tio, kiel sociaj teknologiaĵoj plenumas esence gravan rolon en regionoj sen infrastrukturo kaj for de grandaj urboj.

En ĉi tiu jaro oni favoris sep edukinstalaĵojn en Collana Tolar, 68 kilometrojn for de La Paz: Centro Belén, Nueva Esperanza, Taracollo, Huancarani, Wichicollo, Franz Tamayo kaj Quillcoma. En tiu regiono vivas etaj kamparanaj komunumoj de indiana deveno, tradiciaj en la boliviana Altebenajo.

Edukado por ĉiuj

Helpi malpliigi la kvanton da malaprobaj kaj de antaŭtempa forlaso el lernejoj, krom investi en la lernejan kvaliton. Tiucele, LBV de Bolivio okazigas ekde la jaro 2010 la programon *Edukado en Agado*, kiu tiel kontribuas por plenumado de la dua Jarmila Evoluiga Celo*: “Unuagrada bonkvalita edukado por ĉiuj”.

En la monato aprilo, ekzemple, la programo *Edukado en Agado* transdonis centojn da ensembloj de lerneja kaj pedagogia materialo, kaj krome funkciigis atelierojn por kapabligo de instruistoj, kun speciala atento pri strategioj kaj rimedoj por faciligi lernadon kaj starigon de ligoj inter edukistoj kaj lernantoj,

“Ni dankas por tiu belega iniciato de LBV. Ĝi multe servas al instruistoj kaj al infanoj okaze de lerneja laboro. Ekzemple, ili ne havis kolorajn kraĵojn, kaj nun ili alvenas feliĉaj kun siaj tornistroj por lerni.”

Jimena Huanca Espinoza

Edukisto en komunumo Huancarani, Bolivio.

*JEC — Estas ok Jarmilaj Evoluigaj Celoj. Ili reprezentas aron da celoj, kiujn oni atingu ĝis la jaro 2015, kun la intenco plibonigi la vivkvaliton de la Homaro kaj garanti daŭripovecon de la planedo. Temas pri unu el la plej gravaj mondaj defioj, starigita de 191 Ŝtatoj-membroj de Unuiĝintaj Nacioj (UN), okaze de la Jarmila Kupolo, en la jaro 2000. Ili estas: 1- Estingi malsaton kaj mizeron; 2- Baza bonkvalita edukado al ĉiuj; 3- Interseksa egaleco kaj valorigo de virinoj; 4- Malpliigi la mortokvanton de infanoj; 5- Pliibonigi sanon de gravedulinoj; 6- Batali kontraŭ aids, malarie kaj aliaj malsanoj; 7- Pli bona vivkvalito kaj respekto al la naturmedio; 8- Ĉiuj laboru por elvolviĝo.



Akivo BV

PORTUGALUJO

Fotoj: Arkivo BV



1

LBV de Portugalujo aŭspicias ekde 2001 sociedukan programon *Feliĉa Rido*. Tiu agado kalkulas nuntempe pri tri moveblaj instalaĵoj por buŝa sano (1) kaj pli ol 200 kunlaborantoj. Ĉiumonate, komunumaj laboristoj el tiu Instituto vizitas asociojn, lernejojn, infanĝardenojn kaj aliajn lokojn en la urboj Porto, en Coimbra kaj en Lisbono, por plenumi pedagogiajn aktivecojn, teoriajn kaj praktikajn, en la kampo de buŝa sano, kiuj inkluzivas prelegojn, serĉadon, aplikadon de fluoro kaj procesojn por prevento. (2 kaj 3) Bonaj praktikoj por buŝa higieno, kiel ĝusta broso, uzado de dentfadeno kaj sana nutrado, estas parto de la temoj de teoriaj kaj praktikaj kunsidoj. En la jaro 2012, tiu programo faris pli ol 205 mil preventajn intervenojn en flegado de infanoj kaj plenaĝuloj.



2



3

inkluzive de gepatroj, en multaj tiaj aktivecoj.

Laŭ **Federico Chira**, instruisto kaj ĝenerala direktoro de edukaj instalaĵoj en komunumo de Franz Tamayo, la programo de LBV reprezentas gravan stimulon al ĉiuj. *“Dankon! Nome de instruistoj kaj de familianoj de la gelernantoj, mi dankas, ĉar ĝi estas kompleta materialo, kaj tio stimulas la infanojn veni al la lernejo. Ni neniam havis tiaspecan apogon, pro tio ni dankas.”*

Puraj dentoj, sanaj infanoj

Per tiu programo oni okazigas atelierojn pri buŝa sano, kiuj alportas informojn pri ĝusta dentbrosado. Transdonado de ensembloj de materialo por persona higieno kompletigas la agadon. Tiu laboro elvolviĝas kunlabore kun profesoroj kaj studentoj el universitatoj Franz Tamayo kaj El Alto, kaj havas tri

etapojn. La unua konsistas el vizitado al komunumoj por rekono kaj ellaborado de registro pri personoj, kiujn oni asistas.

En la dua etapo, per prelegoj, volontulaj dentkuracistoj orientas gepatrojn, instruistojn kaj gelernantojn pri la graveco ĝuste brosi la dentojn. Sekve, ili flegas pacientojn odontologie, inkluzivante resanigadon de karioj kaj aplikadon de fluoron, krom kirurgia eligado de dentoj, se necese. En la ensemblo por persona higieno, transdonata al infanoj, enestas: glaso, dentbrosado de taŭga grandeco laŭ la grandeco de la infano, dentokremo, bantuko, briksapo kaj tornistro por enteno de la materialo.

La tria kaj lasta etapo en tiu agado antaŭvidas revenon al tiuj samaj lernejoj, por refortigi la instigon al preventado, per ateliero “Ĉirkaŭdentaj malsanoj”. Oni ankaŭ ŝanĝas la dentobrosojn transdonitajn komence de la programo,

Paragvajo: Teknologio por nutrosekureco favoras indianan komunumon

Jen loko kie LBV agadas: kvartalo Yukyty, en la ĉirkaŭaĵo de Asunción, la paragvaja ĉefurbo, en tereno proksima al sanitara rubamasejo. La agado: *Komunuma Daŭripova Legomĝardeno*. Komunumo asistata: indiana tribo Cerro Poty.

En tiu loko 40 familioj estas favorataj per plantado de manĝeblaj folioj kaj legomoj. Tiun agadon apogas agrokulturinĝenieroj el Ministerio pri Agrokulturo kaj Bestobredado en Paragvajo. Kion la legomĝardeno produktas, tio taŭgas por konsumado de la familioj kaj krome por enspezigi kroman gajnon al ili, ĉar ili sukcesas vendi la restantan produktadon. La komunumo regule akceptas orientadon de agronomiistoj en praktikaj instruoj pri konservado de nutraĵoj, ĝusta stokado, purigado kaj maksimuma profitado de la legomoj. La familioj lernas ankaŭ preparadon de salatoj, tortoj, tortetoj kaj longdaŭraj nutrokonservaĵoj.



Fotoj: Allison Bello



aldone al individua ekzamenado, per ludoagado, por konstati, ĉu la lernantoj alkutimiĝis al ĝusta buŝhigieno.

Edukistoj kaj sanprofesiuloj elstarigas la valoron de tiu programo en tiaj kamparaj komunumoj, kie granda parto de la loĝantaro ne havas eĉ dentobroson, kaj tiuj, kiuj ĝin havas, tiuj ofte devas uzi ĝin kune kun aliaj familianoj. Instruisto **Orlando Marca Rodríguez**, el Lernejo Rosa Grover, emfazas: “Malmultaj el ni zorgas pri dentohigieno kaj malmultaj informoj estas disponeblaj pri tiu temo. Mi

emas esprimi al LBV, kiu alprenis la taskon kunlabori por tio, mian profundan dankon, nome de la komunumo kaj de la infanoj, kiuj profitas de tiu kampanjo.”

Volontula dentkuracisto en la programo de LBV, d-rino **Jimena Ajata**, el Publika Universitato de El Alto, ne kaŝas sian kontentiĝon, ke ŝi partoprenas tian sociedukan agadon: “Tio estas bela agado, kiun vi realigas. Mi estas feliĉa, ke mi vidas, ke tia apogo atingas necesbezonan loĝantaron kaj junulojn.” ■

NEW YORK/USONO



Fotoj: Eliana Gonçalves



En la forumo pri partnerecoj en la kampo de edukado per scienco, teknologio kaj navigado, de Ekosok/UN, la publiko akompanis tempanelon, en kiu kontribuis Legio de Bona Volo. Elstare aperas la reprezentanto de LBV ĉe UN, Danilo Parmegiani.

LBV kunorganizas forumon pri teknologio kaj edukado ĉe UN

El la Redaktejo

En la kunteksto de mondaj agadoj favore al rajtoj de infanoj, unu bezonata proceso por universaligo de edukado plu okazis dum la lasta jardeko. Tamen, datumoj el Organizo de Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo (Unesko) montras, ke ankoraŭ multo estas farenda, malgraŭ ĉiuj klopodoj. En la tuta mondo, oni kalkulas, ke pli ol 72 milionoj da geknaboj, en la aĝo por frekventi lastajn jarojn de la unuagrada instruado, staras ekster la lernejo.

Por diskuti tiun problemon, Ekonomia kaj Socia Konsilantaro de Organizo de Unuiĝintaj Nacioj (Ekosok/UN) okazigis je la 16-a de majo 2013 la forumon *Konstrui partnerecojn en la kampo de Edukado per Scienco, Teknologio kaj Navigado*. Tiu evento okazis ĉe la sidejo de UN en **New York/Usono**, kaj ricevis la apogon de Legio de Bona Volo de Usono, de Global Millennium Development Foundation (Monda Fondaĵo por Elvolviĝo en la Jarmilo) kaj de The World Association of Former



“Mia sperto en la forumo estis nekredeble bona, mi multon lernis de miaj kolegoj en la panelo. Ĉiu el ili sin montris entuziasma. Efektive ili emas helpi infanojn, kunlabori kun la mondo de edukado.”

Cristin Frodella

Estro de Education Marketing en Google



“Mi estas kontenta post la prelegoj, speciale pro la prezento de Legio de Bona Volo. Al mi plaĉis la nomo Bona Volo kaj aparte la Pedagogio de Amo, por infanoj ĝis la aĝo 10-jara. Mi estas psikologo, sekve mi scias, kiel grave estas respekti emociojn kaj sentojn de infanoj. Ne nur la intelektan elvolviĝon, sed ankaŭ ilian tutecan personecon.”

Joseph DeMeyer

Reprezentanto de The Society for the Psychological Study of Social Issues (Societo por Psikologiaj Studoj pri Sociaj Aferoj).

United Nations Internes and Fellows (Monda Asocio de Amikoj de Unuiĝintaj Nacioj; WAFUNIF, komencliteroj en la angla lingvo).

Tiuokaze, gvidantoj diskutis la rolon de scienco kaj de teknologio en progreso de edukado, same kiel pli efektivan internacian kunlaboradon, kiu garantiu partoprenon de registaroj, civila socio kaj privata sektoro por plenumado de la ok Jarmilaj Evoluigaj Celoj (JEC) kaj de la Celoj por Daŭripova Elvolviĝo (CDE), laŭ la ĉi-suba kadro, kun speciala atento pri “Bonkvalita elementa edukado por ĉiuj”.

La prelego de la reprezentanto de LBV ĉe UN, **Danilo Parmegiani**, kies temo estis “Estigi elvolviĝon kaj socian inkluzivadon per edukado kaj teknologio”, prezentis praktikajn rezultojn de Pedagogio de Amo (kiu

celas infanojn ĝis la aĝo 10-jara) kaj de Pedagogio de Ekumena Civitano (ekde la 11-jaraĝo), kiuj prilaboras Kulturon de Paco kaj valorigon de homoj kiel tutecaj estuloj (legu aliajn informojn pri la pedagogia linio de LBV sur p. 72).

La panelon partoprenis krome diversaj altranguloj en teknologia industrio kaj reprezentantoj de universitatoj kaj de la internacia komunumo. Oni elstarigu la ĉeeston de la prezidanto de Ekosok/UN, ambasadoro **Néstor Osorio**. ■

CDE – novaj celoj de Unuiĝintaj Nacioj



Pri la propono difini navigadon kiel unu el la Celoj por Daŭripova Elvolviĝo (CDE), kiu espereble ekfunkcios en la jaro 2015, komentas la prezidanto de Ekonomia kaj Socia Konsilantaro de Organizo de Unuiĝintaj Nacioj, Néstor Osorio: “Mi pensas, ke ĝi estas plurdirekta parto de multaj el la celoj, kiuj eniros aldonan periodon ekde la jaro 2015. Ni parolas pri CDE, tio estas, kiel fari ion trans la JEC [Jarmilaj Evoluigaj Celoj] kaj kunigi industriajn landojn kun la evoluantaj, por konstante kaj senrevenue plenumi la fundamentajn celojn por tuteca daŭripoveco. (...) Ni parolas pri konservado de akvo, pri pli videblaj [daŭripovaj] urboj, pri nutrosekureco, pri infrastrukturo kaj pri kontrolado de elfjetado de kontaĝaj gasoj. Necesas senkarbonigi la mondon. Kaj ĉio tio estas parto de novigo.”

(Fonto: Envolverde – Cifereca revuo de Instituto Envolverde.)



MONTEVIDEO

La urugvaja modelo de Plano Ceibal

Atingoj kaj lernitaĵoj pri novigado kun teknologio
por ia inkluziviga edukado

Laura Bianchi



Laura Bianchi estas asessoro de Plano Ceibal por la socia plivalorigo de TIK. Licensiulo pri Edukado kun emfazo je esplorado kaj post-diplomiĝinto pri Edukado kaj Socio, en Fakultato de Homaj Sciencoj (CCHH), de Katolika

Universitato en Urugvajo. Universitata teknikisto pri Administrado de Entreprenoj, en Fakultato de Ekonomiaj Sciencoj kaj de Administrado (CCEEA), de la Universitato de la Respubliko. Administranto de projektoj rilate al programoj por kunlaborado en socieduka kampo. Enlanda kaj internacia konsultanto pri desegno, administrado kaj taksado de sociaj projektoj, programoj por plibonigo de administrado kaj desegno de sistemoj de informado. Universitata profesoro.

De longa tempo edukaj sistemoj en pluraj landoj vekas sentojn pri nekontenteco flanke de civitanoj, kun propono nealloga kaj nestimula al lernantoj, kun niveloj de lernado nekontentigaj rilate la nuntempan realaĵon.

Fronte al tio, la defio sidas en la celo atingi inkluzivigan edukadon, nome “Edukado por ĉiuj”, kiel pledas Organizo de Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo (Unesko). Tio estas, edukado, kiu starigu universalan alireblecon, plenumu kvaliton krom amplekseco, plivastigu rimedojn kaj lokojn por elementa edukado, plibonigu lernokondiĉojn kaj plifortigu ligojn inter malsamaj sektoroj kaj grupoj en la socio.

Tamen, manko de alirebleco al novaj teknologiaĵoj implicas unu plian formon de socia ekskludado. Pro tio, fari pli alirebla la uzadon

de Teknologiaĵoj por Informado kaj Komunikado (TIK) estas parto de la tuto da celoj starigitaj de UN, la tiel nomataj Jarmilaj Evoluigaj Celoj (JEC)*¹. Sekve, edukado prenas ĉefan rolon en elvolvado de kapabloj por profiti la teknologiaĵojn.

Plano Ceibal (Eduka Konektebleco de Baza Informadiko por Lernado *On-line*), lanĉita de la registaro en Urugvajo fine de la jaro 2006, atingis la celon universaligi alireblecon al TIK-oj en la eduksistemo en nia lando, liverante po unu portebla komputilo konektita al interreto al ĉiuj infanoj kaj adoleskantoj, kiuj eniras la publikan edukadon elementan kaj mezgradan*². Krome, Ceibal estis aplikita per pilota projekto en infanedukado. Samtempe, gelernantoj alportas personajn komputilojn hejmen, kaj tiel ampleksigas al familianoj kaj kaŭzas ŝanĝon je ciferoj rilate ciferecan inkluzivigon.

Tiel, oni ligas ciferecan alfabetigon al lerneja medio, same kiel al ejoj por starigo de bonaj praktikoj kaj agadoj de civitaneco, precipe koncerne la sencon pri aparteneco, fidon pri institucioj, pri solidareco kaj pri starigado de demokratia kulturo kun la celo plifortigi la ideon pri civitanoj kiel homoj, kiuj havas rajtojn, persone kaj kolektive kompromisitaj kun komunaj interesoj.

Edukado por ĉiuj signifas produkti kapablecojn al profitado de TIK-oj

Sur paĝo 92 de la Raporto pri Homa Elvolviĝo por Latinameriko kaj Karibio 2010, rilate la analizadon de faktoroj kiuj influas malegalecon, oni konstatas malefikecon de publikaj

*¹ **Celo 8.F** — Kunlabore kun la privata sektoro, fari, ke la bonfaroj de novaj teknologiaĵoj estu pli alireblaj, precipe tiuj por informado kaj komunikado.

*² Edukado unuagrada kaj mezgrada en Urugvajo, kiu konsistas el du cikloj: baza (3 jaroj) kaj dua ciklo aŭ bakalaŭreca (3 jaroj).



Fotoj: David Junior



Knaboj kaj knabinoj en la programo *Infanoj: Estonteco en Estanteco!*, en Montevideo, Urugvajo, ricevis faldeblajn komputilojn per Plano Ceibal. Tiu iniciato de la urugvaja registaro baziĝas sur projekto “*Po unu komputilo al ĉiu lernanto*” (*One Laptop per Child*, en la angla lingvo), elpensita de **Nicholas Negroponte**, inĝeniero el Massachussets Institute of Technology (MIT). Alirebleco al interreto kaj al komputiloj daŭre kontribuas al plibonigo en edukado de infanoj kaj malpliigo de cifereca inkluzivado inter plenaĝuloj.

politikoj, kiam ĝia sinteno estas tradicia, bazita nur je materiaj kondiĉoj. Pro tio, en la lastaj jaroj, oni enmetis aliajn elementojn por analizado, kiel infuon de subjektivaj aspektoj en socia malegaleco.

Tiusence, oni observas la grandegan klopodon de multaj landoj por demokratigi alireblecon al TIK-oj per edukado, pro la konvinkiĝo, ke disponigo de teknologiaĵoj (alirebleco) kondukas al utiligado flanke de tiuj, kiuj estis limigitaj aŭ forigitaj pro materiaj kondiĉoj. Malgraŭ la progresoj ĉe politikoj de alirebleco —

teknologia infrastrukturo kaj ciferecaj rimedoj — oni konstatas, ke troviĝas malfacilaĵoj aŭ rezultoj nesufiĉaj por malpliigi ciferecan ekskludadon, same je uzado de TIK-oj kiel je akirado de kapablecoj, kiuj permesas utiligi ilin kaj estigas ŝanĝojn, kun daŭraj konkeroj kaj pliigo de konoj.

Politikoj por inkluzivado devas havi kiel celon demokratigon de alirebleco kaj atenti pri enkonduko de strategioj rilate la bezonojn kaj atendojn de individuoj koncerne ilian bonfarton. Enkonduki ne signifas pensi pri unudirekta, meĥanika alpreno,

ĉar prefere ĝi implicas konscii pri tio, kion ĉiu homo konsideras grava kaj profitodona por plibonigo de sia propra vivkvalito.

Plano Ceibal rekonis la bezonon analizi tiujn malsamajn situaciojn kaj serĉi manierojn interagi kun ili per taŭgaj interrilatoj. Sekve, tiel kiel oni transdonis porteblajn komputilojn en lerneja medio, same la projekto asociiĝis al volontuloj kaj kunlaborantoj, publikaj kaj privataj, por starigi kontakton kun lokaj retoj kaj iliaj uzantoj.

Fine, Plano Ceibal atestas, ke principoj de ia edukado por ĉiuj postulas viglan kuniĝon inter ĉiuj agantoj, kiuj povas kontribui por strategio de elvolviĝo de kulturaj, edukaj transformoj, kun forta identeco kaj taŭga por *stakeholders*

(strategia publiko). Iasence, tiu difino rekonsideras distingon inter lernejo kaj komunumo, por ŝanĝi la perspektivon al agado de kunlaboro favore al pli efika plenumado de subjektivaj aspektoj, kiuj koncernas utiligadon de TIK-oj.

Konkludo

La sperto kaj konoj amasigitaj de Ceibal ĉe kunigado de teknologio al inkluziviga edukado estas parto de koncepto pri lando, kiu proponas plivastigon de ŝancoj de elvolviĝo por civitanoj.

Alirebleco al konoj kaj al informado per novaj teknologiaĵoj estas unu el la ĉefaj kapabloj en la 21-a jarcento, kiujn oni konsideras kiel kondiĉojn por atingi bonkvalitan edukadon por ĉiuj. ■

Plano Ceibal — Tiun projekton iniciatis prezidento **Tabaré Vásquez**, en decembro 2006. La unua agado estis transdonado de faldeblaj komputiloj al 150 gelnantoj en urugvaja lernejo en departemento Florida, meze de la jaro 2007. Post kvar jaroj, ĉiuj lernantoj en publikaj lernejoj en tiu lando jam havis porteblan komputilon. La disdonado bonfaris ankaŭ al instruistoj, kaj tiu iniciato faris, ke Urugvajo estis la unua lando, kiu plenumis universalan ampleksigon al cifereca inkluzivado, kunigante teknologiojn por edukado kaj enhejma. Danke al tiu programo, kreskis la frekventado de lernantoj ĉe lernejoj, krom aliro al interreto, kaj malpliĝis cifereca ekskludado ankaŭ de plenaĝuloj.

Konkeroj kaj spertiĝoj de Ceibal en edukado

- Analizoj fare de Ceibal kunigas perceptojn de instruistoj kaj direktoroj pri la pozitiva influo de uzado de personaj komputiloj je enklasa lernoefikeco.
- En la pedagogia kampo, la perceptado pri bonfaroj de Plano Ceibal je lernejoefikeco kaj la antaŭvido pri plibonigo de lernado flanke de familioj (uzado de komputiloj) reprezentas pozitivajn stimulojn al gepatroj kaj instruistoj, koncerne tion, kion ili esperas kaj kion ili faras, por ke iliaj idoj kaj lernantoj havu bonan edukadon. Tio kaŭzas fidon pri bona lerneja profitado flanke de edukatoj ³.
- Indas rimarkigi, ke la ĉefaj malfacilaĵoj ligiĝas al sociekonomiaj kondiĉoj en la helpata homgrupo kaj al lokaj malegalecoj.
- Forta akceptemo pri Plano Ceibal flanke de civitanoj kaj sukcesaj spertoj montras, ke la projekto kunigas movadon de renovigado de signifo, kiuj ŝajne respondas en la kolektiva menso al tre bona okazo por ties bonfarto. Inter tiuj bonfaroj, troviĝas renovigita kompromiso inter lernejoj kaj la civila socio favore al pli kaj pli inkluziviga edukado.

³ Raporto pri Homa Elvolviĝo rilate Latinamerikon kaj Karibion kunigas evidentaĵojn pri tio, kiel aspiroj kaj kapablecoj de gepatroj dum zorgado pri siaj idoj influas ilian nivelon de lerneja edukiteco aŭ la alireblecon al iuj servoj; kaj datumoj pri faktoroj, kiuj influas la formiĝon de gepatraj aspiroj rilate la gradon de edukiĝo, kiun ili deziras por siaj gefiloj, montras la proceson de intergeneracia transdonado de aspiroj, kiu karakterizas subjektivajn aspektojn de malegaleco en la regiono, kie tiuj aspiroj estas neegale distribuitaj en socio (2010, p.93).



EDUKADO KIU NOVIGAS KAJ INKLUZIVIGAS

Lernantoj lernas Libras por pli granda interagado kun kolegoj

Mariane de Oliveira

Brazilo lastatempe progresis en kampoj scienca kaj teknologia, sed nun prezentas ankaŭ ĉiajn kondiĉojn por fari kvalitan kaj kvantan salton en procesoj de navigado survoje al daŭripova elvolviĝo. Legio de Bona Volo pensas, ke tia mensostato povas plivastiĝi al ĉiuj kampoj, precipe ekde edukado, se oni konsideras, ke scio

estas grava faktoro, kiu helpas naciojn venki defiojn. Kiel diras la direktoro-prezidanto de LBV, edukanto José de Paiva Netto: *“Scio estas eterna riĉaĵo de la homo kaj de lia senmorta Spirito. En Ekonomio, ĝi produktas riĉecon. Kune kun Frata Amo, ĝi kreos prosperon”*.

Tiel, laborante por ia pli bona mondo kaj

por pli feliĉa Homaro, LBV kreis Pedagogion de Amo kaj Pedagogion de Ekumena Civitano (legu pli pri tiu temo sur p.72). Ĝia aparta trajto estas konsideri individuon kiel tutecan estulon, kiu posedas intelekton, sentemon kaj spiriton.

Respekto pri individueco kaj pri bezonoj de ĉiu edukato kaj asistato estas parto de la edukaj strategioj elvolvataj ĉe lernejoj kaj Komunumaj Centroj por Socia Asistado de LBV. Proponante al infanoj kaj junuloj bonkvalitan edukadon, la Instituto formas civitanon kaj preparas lin por enveni la mondon de laboro, konscian pri siaj rajtoj kaj devoj.

Ebla inkluzivado

Raporto pri **Eduardo**, filo de **Maria do Carmo**^{*1} kaj lernanto ĉe Edukensemblo Bona Volo (kiu konsistas el Granda Infanvartejo Jesuo kaj el Instituto por Edukado José de Paiva Netto), en **São Paulo**, estas unu inter multaj ekzemploj pri tio, kiel tiu eduka sistemo, kune kun novigaj iniciatoj, kapablas helpi plibonigadon en la vivo de infanoj, junuloj kaj plenaĝuloj akceptataj de la Instituto.

Eĉ por spertaj gepatroj, varti kaj eduki infanon povas alporti grandajn defiojn. Ne alie okazas al Maria do Carmo, kaj ŝia filo bezonis komence specialan atenton. Kiu nun rigardas la knabon, dum li ĝoje partoprenas lecionojn kaj aktivecojn apud siaj kolegoj ĉe Edukensemblo Bona Volo, tiu ne sukcesas prezenti al si la malfacilaĵojn, kiujn la familio alfrontis pro diagnozo pri duflanka surdeco kaj problemoj kaŭzataj de cerba paralizo^{*2}, konsekvenco de kora ekhalto, kiun Eduardo suferis du tagojn post sia naskiĝo.



Dum la lecionoj, Eduardo interagadas kun instruistoj kaj kolegoj per Brazilia Gestolingvo.

Krom la ordinaraj zorgoj, kiujn ĉiu infano bezonas, la gepatroj pli kaj pli maltrankviliĝis pri la estonteco de Eduardo, ĉar la stato de surdeco, kune kun konsekvencoj de tiu malsano, malfaciligos lian kognan elvolviĝon. Laŭ kuracista rekomendo, oni faris operacion por enplantado de kokleo (rafinita elektrokina aparato, ankaŭ alnomata artefarita orelo, kiu permesas, ke la uzanto havu aŭdsenton similan al la fiziologia), por helpi plian konekteblecon kaj intereson pri la medio kaj pri sociaj interagoj. *“Komence, ni tre konsterniĝis, ĉar ni rimarkis, ke multaj homoj rigardas lin kompateme, ili pensis, ke li estas nekapabla, kvazaŭ li estus ne kapabla pensi”*, la patrino diris.

Kiam la gepatroj devis serĉi edukan institucion por sia ido, estis prioritare elekti tiun, kiu prilaboras ne nur aspektojn koncernajn al intelekta kaj

^{*1} Eduardo kaj Maria do Carmo estas fikciaj nomoj.

^{*2} Cerba paralizo priskribas grupon da misfunkcioj en la elvolviĝo de movokapablo kaj korposinteno, kio kaŭzas limigojn en aktivecoj. Oni atribuas ilin al neevoluantaj perturboj, kiuj okazas en la elvolviĝanta cerbo. Tiuj movo-misfunkcioj okazas ĝenerale samtempe kun ŝanĝoj en la sentado, perceptado, kognokapablo, komunikokapablo kaj konduto, kaj konvulsioj povas ankaŭ okazi. (Fonto: Brazilia Asocio pri Cerba Paralizo)



Gelernantoj ĉe Edukensemblo Bona Volo, en la ĉefurbo São Paulo, lernas dum lerneja alterna tagperiodo komunikado per Brazila Gestolingvo.



Fotoj: Vivian R. Ferreira

Ĝoja, partoprenriĉa kunvivado: Knaboj kaj knabinoj akceptitaj en la programon *Infanoj: Estonteco en Estanteco!*, en la urbo **Anápolis**, Brazilo, havas du surdajn kolegojn, kiuj stimulas ilin lerni la gestolingvon Libras. Ambaŭ estas konstante ĉirkaŭataj de amikoj kaj aktive partoprenas la aktivecojn.



João Freida

kogna formiĝo, sed ankaŭ atentis pri elvolviĝo de amo kaj emocioj. Kaj ĉe Legio de Bona Volo ili trovis sekuran medion por tie fidi pri la edukado de la knabo.

Kiam Eduardo alvenis ĉe Edukensemblo Bona Volo, je sia 3-a aĝojaro, li kaŭzis mobilizon de la plurfaka laborgrupo en tiu instalaĵo. Oni rapide planis edukajn strategiojn por inkluzivado, en kaj ekster la klaso, aldone al tiuj laŭleĝe devigaj — Leĝodekreto n-ro 5.626/05 —, kiu devigas, ke regulaj, privataj kaj publikaj lernejoj dungu interpretiston kaj/aŭ tradukiston de la brazila gestolingvo Libras, kiam ĉeestas lernanto kun aŭdoperdo

(duflanka, parta aŭ kompleta). Tamen, eĉ per uzado de rimedoj kaj de kreskanta fakiĝo flanke de edukistoj rilate al Libras, oni instigis gelernantojn al aliaj aktivecoj, por daŭre estigi interagadon inter ili kaj tiu kolego, konsiderante liajn malfacilaĵojn.

Proponi al gelernantoj en la elementa edukado, ĝis la kvina jaro, lernadon pri komunikado per Libras kiel ĉiutagan praktikadon dum alterna lerneja tagperiodo reprezentis gravan progreson en la sociigado de Eduardo, kiu komencis pli bone interrilati kun siaj kolegoj. *“Kiam la lernejo komencis laboron per Libras kaj la infanoj komencis komunikiĝi kun li, tio estis sento de granda trankvileco por mi kaj por mia edzo. Antaŭ tio, la infanoj prenis iujn sintenojn antaŭ li, ĉar ili ne sciis, ĉu li sukcesos. Nun, li partoprenas diversajn aktivecojn, li esprimas tion, kion li sentas. Lia mieno ŝanĝiĝis, li fariĝis pli trankvila. Eĉ la familia ligiĝo pliboniĝis”*, Maria do Carmo komentis.

Antaŭ ne longe, la lernejo intervenis ankaŭ proponante al la knabo etan porteblan komputilon, por faciligi al li alfabetiĝon. Pro la cerba paralizo, lia movkapablo estis damaĝita, kaj tio malhelpis lin evolvi la movon de



João Nery

Sporto: granda helpanto de edukado

Ekde la jaro 2011, Eduka Centro de LBV en **Rio de Janeiro**, same kiel aliaj instalaĵoj de tiu Instituto en Brazilo, kunigas sportopraktikadon al edukado, kun la celo ne nur trovi novajn talentojn, sed ankaŭ formi civitanojn. Edukatoj lernas tiel la valoron kulturi senton pri kunlaborado kaj respekton al sia similulo, eĉ en treege konkurema socio.

Nuntempe, ĵudo kaj ĉambra futbalo, ina kaj vira, estas la sportoj elvolvataj en la lernejo de tiu Instituto. Laŭ helpdirektoro **Claudia Caldas**, ekde la alpreno de sporta praktikado, lernantoj, kiuj ĝis tiam ne montris kontentigan lernejan atingon komencis elstari same je studado kiel je sporta konkurado, kaj fariĝis pozitivaj ekzemploj.



Nathália Valério

Claudia Caldas

Lernantoj en lernejoj de LBV, kiuj reprezentas la Institucion en konkuroj pri ĵudo tra la lando estas ekzemploj pri tio. *“Mi trovis matematikon malfacila kaj nun mi lernas multe, mi estas pli disciplina”*, diris 13-jara **Karen**, kiu frekventas la 7-an lernejaron. Laŭ 14-jara **Tiago**, el la 7-a lernejararo, granda paŝo estis la alveno al LBV kaj trovi ĵudon. *“Miaj lernopontoj plialtiĝis, mi preĝas antaŭ la trejnoj, sed mi scias, ke krom peti protekton de Dio mi devas vigle trejnadi.”*



Nathália Valério

La ĵudoskipo de Eduka Centro de LBV kunigas 60 gelernantojn, en aĝoj inter la 5-a kaj 14-a jaroj. El la venkitaj konkuroj, elstaras tiu de Plej Bona Asocio en Ŝtato Rio de Janeiro, en la jaroj 2011 kaj 2012, sinsekve.

En junio 2013, la skipo sub-14 (-jara) de ina, ĉambra futbalo ĉe Instituto por Edukado José de Paiva Netto fariĝis ĉampiono dum Lernejaj Sportludoj en Ŝtato São Paulo, plej granda sporta amatora evento en Brazilo.

Fotoj: Nathalia Valério



RIO DE JANEIRO (BRAZILIO)
Ĉe Eduka Centro de LBV en Rio de Janeiro, infanoj kun lernomalfacileco ricevas la helpon de Ĉambro por Lerneja Apogo, por ensorbi lerneajn instruojn.



RIO DE JANEIRO (BRAZILIO)
Ŝakludo ĉe la lernejo — Ŝakludon oni konsideras kiel pedagogian sporton, ĉar ĝi instruas pripensi antaŭ ol ekagi. Ĝi helpas lernadon de lernobjektoj, kiuj postulas plian logikan kaj strategian rezonkapablon. Ĝi estas ankaŭ rimedo por instruado de aferoj koncernantaj probablecon, statistikon, karteziajn liniojn kaj aliajn. En Rio de Janeiro, praktikado de tiu aktiveco inter gelernantoj de LBV daŭre antaŭenpuŝas kognan elvolviĝon, krom favori bonan kunvivadon inter infanoj en lerneja medio.

pinĉado kaj pinĉopremado, kiu estas necesa en la fazo antaŭ alfabetiĝo kaj ebligas la delikatmovan skribadon. Per tiu nova perilo, Eduardo ekakompanis la enhavojn de la lernokajero uzata ĉe tiu lernoinstalaĵo, en formato PDF; por la necesaj notoj, li kalkulas pri la akompanado de edukistinoj, kiuj komunikiĝas kun li per Libras.

Laŭ **Ana Paula da Silva Custódio**, kunordiganto de projekto *LBV* —

Plifortigi kapablojn, okazis signifo-plena gajno por la kolegoj: “Infanoj aŭdkapablaj lernas pri la kulturo de surduloj. Estas emociige vidi, kiom ili montras respekton al diferencoj”. Emociita pro tiu tuta zorgemo rilate la situacion de sia filo, Maria do Carmo substrekis: “Ni ja tre dankas. La lernejo agigis ĉiujn tiujn homojn por akcepti mian filon”.

Specifaj rimedoj kaj emocia apogado

Lernantoj kun lernomalfacilaĵoj kapablas ensorbi sciojn kiel ĉiu alia persono, sed por tio ili bezonas pli da tempo kaj specialajn zorgojn.

En la ĉefurbo de Rio, strategio elvolvita de LBV por helpi intelektan kaj kognan formiĝon de knabinoj kaj knaboj kun tiaj trajtoj estis la kreo de Ĉambro por Lerneja Apogo. Temas pri spaco ĉe Eduka Centro de Legio de Bona Volo, speciale preparita por tiaj gelernantoj, kun mebloj, komputilaj rimedoj, specifaj ekipaĵoj kaj didaktika kaj pedagogia materialo (ludiloj, muldoarto, libroj kaj apogaj ludoj).

Tiuj intervenoj prilaboras amokaj emociaspektojn ĉe la edukatoj, tiel ke ili stimulas memestimon, memfidon kaj amemon, nome pozitivajn faktorojn en lerneja kaj persona vivo.

“La speciala aspekto de tiu laboro okazanta ĉe Ĉambro por Lerneja Apogo (...) estas tio, ke ni okupiĝas ne nur pri la helpo al lernantoj koncerne la enhavon de la lernobjektoj, ni deziras pli. Ni prilaboras ankaŭ la emocian ekvilibron, por ke ili fartu bone emocie, korpe kaj intelekte, pretaj por lernado de novaj aferoj”, diris **Márcia Quesada**, direktorino de tiu instruejo de LBV en Rio. ■

**BRAZILO**

survoje al inkluziviga ekonomio surbaze de konoj kaj novigado

Glauco Arbix

Brazila ekonomio dum la lastaj jaroj prezentas apartan kvaliton de kreskado, kun malpliigo de malegaleco kaj de malriĉeco, inkluziviga progreso karakterizata de malpliigo

de malegalecoj en ĉiuj sencoj: socia malegaleco, regiona malegaleco, malegaleco inter malgrandaj, mezgrandaj kaj grandaj urboj kaj seksa malegaleco.

Edu Morais



Brazila sociologiisto Glauco Arbix estas prezidanto de FINEP — Brazila Agentejo por Novigado. Li studis je postdoktoriĝa nivelo ĉe Massachusetts Institute of Technology — MIT (Usono, 1999 kaj

2010), ĉe Universitato de Columbia (Usono, 2007 kaj 2009), ĉe Universitato de Kalifornio — Berkeley (Usono, 2008) kaj ĉe London School of Economics and Political Science (Britio, 2002).

Malgraŭ malfacilaĵoj, kiuj persistas en internacia ekonomio, ekde pligraviĝo de la monda krizo en la jaro 2008, la brazila ekonomio plu kreskas, paŝo post paŝo. Laŭ datumoj de Brazila Instituto pri Geografio kaj Statistiko (IBGE), dum la tempo inter 2007 kaj 2012, Brazilo prezentis mezuman kreskon de Malneta Enlanda Produkto je proksimume 3,7% jare.

Ĉe la fundamento de tia ĵusa kreskado troviĝas politikoj por investado je infrastrukturo, kiel la Programo de Akcelado de Kreskado (PAC); por reala plivalorigo de la minimuma salajro, kio plialtigas la aĉetokapablon de laboristoj; sociaj politikoj por transdonado de enspezokapablo, kiu ebligas forigon de 36 milionoj da homoj el stato de ekstrema malriĉeco, nur inter la jaroj 2011 kaj 2013 (per preskaŭ kompleta nuligado de tiu kvanto da homoj en tia situacio); krom la malpliigo de interezokostoj, de la ampleksigo de kredito kaj de serio da aliaj politikoj turnitaj al stimulado al investoj, inkluzive kun atento al industriaj

politikoj en prioritataj regionoj kaj registaro multe pli aktiva pri ellaborado kaj aranĝado de politikoj turnitaj al teknologio kaj novigado.

Plifortigo de makroekonomiaj fundamentoj en nia lando, kiel tenado de malalta inflacio, kune kun serio da paŝoj, kiuj celas pliigi konkurokapablon de enlandaj entreprenoj, ĉio tio respeguliĝas en tendenco al pli alta fido flanke de brazilaj industrioentreprenistoj, laŭ datumoj de Fondaĵo Getulio Vargas (FGV), kaj ankaŭ flanke de alilandaj entreprenistoj. Internacia esploro farita de PricewaterhouseCoopers ĉe 1330 CEO-oj*¹ montras, ke Brazilo estas la tria plej ofte menciata de entreprenistoj pri tio, kie ili planas ampleksigi siajn negocojn dum la proksimaj 12 monatoj. Nian landon superas nur Ĉinujo kaj Usono.

Daŭripova elvolviĝo devas baziĝi sur inkluzivigaj politikoj, kiuj plivastigas la internan merkaton kaj la partoprenadon de la loĝantaro je la produktoforto, kaj je pliigo de produktokapablo de la laborforto. Studoj montras, ke investoj je E&E (Esplorado kaj Elvolviĝo) konsistigas plej gravan faktoron, kiu determinas pliigon de produktokapablo. Kaj oni scias, ke investi je novigado povas impulsi, stimuli kaj pligrandigi aldonan investon je ekonomio, je pliampleksigo, modernigo, administrado, eksportado, ĉiunivele.

Plano Novigu Entrepreno, lanĉita je la 14-a de marto ĉi-jara fare de prezidento **Dilma Rousseff**, koncernas al 32,9 miliardoj da realoj kaj reprezentas la prioritaton starigitan de la federacia registaro al produktado de teknologio kaj novigado en prioritataj sektoroj, kun emfazo al pliigo

*CEO — Komencliteroj en la angla lingvo, por Chief Executive Officer, nome plenumprezidanto.

de elspezoj por E&E ĉe entreprenoj, cele al pliigo de produktokapablo kaj de konkurokapablo en ekonomio. Monrimedoj por la Programo Novigu Entrepreno por investado je esploroj, elvolviĝo kaj navigado (EE&N) estos plenumataj precipe per programoj de financado fare de Brazila Agentejo de Navigado (FINEP) kaj fare de Nacia Banko de Ekonomia kaj Socia Elvolviĝo (BNDES).

Tiun planon oni konstruis per forta kunagado de ministerioj, agentejoj kaj aliaj institucioj, kaj tiu koncepto prezentas kvar pilierojn: Prioritata atento pri navigado; Prioritato je sektoroj difinitaj de Plano Pli Granda Brazilo; Integriĝo inter liverantoj de kredito, subvencio, nerepaga koeperado kaj investado je partopreno; kaj Malcentrigo de kredito kaj de subvencio por mikro-, etaj kaj mezgrandaj entreprenoj.

En Brazilo, tre verŝajne, investado je esploroj, elvolviĝo kaj navigado ne plu estas la unua ero flankenlasata en tempo de krizo. De longa tempo navigado jam ne estas privilegio de progresintaj landoj. La brazila industria strukturo ŝanĝiĝas, kaj ĉiam pli granda kvanto da entreprenoj komencas enporti navigadon en siajn strategiojn por kreskado. Eĉ dum malrapida ritmo de ekonomio dum la du lastaj jaroj, petoj pri financado por novigo plu kreskas.

Brazilo posedas nukleon de entreprenoj, kiu novigas per produktado de konoj, kun apogo de altnivelaj centroj de universitatoj, kiuj sukcesas akompani, eĉ se ne konektitaj, la avangardan esploradon je monda nivelo.

Malgraŭ grandegaj progresoj, ĝenerale brazilaj entreprenoj

ankoraŭ malmulte novigas, kaj ni alfrontas defiojn konstrui ekonomion amikeman koncerne navigadon, kapablan ampleksigi tiun dinamikan nukleon kaj stimuli elvolviĝon de teknologiaj kompetentecoj kun kreskanta aldona valoro. Inter plej grandaj defioj, oni elstarigu la pliigon de kvanto da privataj investoj je E&E, ampleksigon de elvolvado de teknologio ĉe entreprenoj, plibonigon de interrilatoj inter entreprenoj, institucioj por esploroj kaj universitatoj, antaŭenigo en formado de kompetentaj homoj en sektoroj turnitaj al elvolvado de teknologioj, precipe en inĝenierartoj, kaj la plifortigo de la merkato de kapitaloj kaj de partopreno de kapitalo *seed* kaj *venture**2 je financado de projektoj de navigado.

Navigado, kiu povas pligrandigi produktadon kaj konkuradon je diversaj niveloj, devas esti realaĵo en landoj malpli evoluintaj koncerne alfrontadon de suferoj kaj limoj en la socio. Por tio, estas esence grava la okazigo de partnerecoj por interŝanĝo de spertoj, interŝanĝo de esploristoj kaj teknologiaĵoj, kaj disvastigo de sukcesaj instituciaj modeloj por superado de defioj propraj al konstruado de ia daŭripova elvolviĝo surbaze de konoj kaj navigado.

Tiel, elvolvado de ekonomio favora al navigado konsistigas mision de registaroj, entreprenoj, institucioj de esplorado kaj universitatoj, krom internaciaj organizoj, por superi ekzistantajn defiojn kaj liveri metodologiojn kaj sistemojn por apogado al investoj, kapablaj pliampleksigi elvolviĝon de navigado kaj teknologio. ■




Prezidento Dilma Rousseff

Roberto Stuckert Filho/Agência Brasil

***2seed kaj venture —**

Investo je semo-kapitalo (*seed*) estas tiu, kiun oni faras en komenca fazo de nova negoco. Unuflanke, entreprenisto ofte prezentas ideojn aŭ surpaperan projekton, kaj la rimedoj helpas lin fari la unuajn paŝojn. Flanke de investanto, staras homoj aŭ institucioj atendantaj altvalorajn gajnojn kaj emaj affronti riskojn; ĝenerale, oni preferas entreprenojn novigemajn kaj kun teknologia fundamento.

Investoj je *venture*-kapitalo (en Brazilo nomata riska kapitalo) serĉas jam establitajn entreprenojn, sed de malgranda aŭ mezgranda strukturo, kun potencialo por kresko. La rimedoj financas unuajn pligrandigojn kaj kondukas la negocon al novaj niveloj en la merkato. Prioritato estas ankaŭ novigemaj entreprenoj (*Fonte: economia.ig.com.br*)



PEDAGOGIO por Paco

Lernejoj kaj ilia tasko formi agantojn
por daŭripova elvolviĝo

Suelí Periotto



Suéli Periotto estas orientanto de Pedagogio de Amo kaj Pedagogio de Ekumena Civitano kaj direktoro de Instituto por Edukado José de Paiva Netto, en São Paulo. Ŝi estas magistro kaj doktoriĝanto pri

Edukado en PUC-SP, preleganto kaj prezentanto de programo *Diskuti Edukadon*, ĉe Supera Reto Bona Volo de Radio.

La pasinta jarcento montris, ke teknologiaj novigoj per si mem ne estas sufiĉaj por atingi daŭripovecon. Necesas pli profunda revizio de paradigmoj kaj valoroj kapablaj transformi la tutmondan socion. La produktado kaj disvastigado de socio-mediaj teknologiaĵoj devas inkluzivi valorigadon de scioj akumilitaj dum miloj da jaroj fare de diversaj kulturoj, kaj ne nur sciencan konon.

Konstantaj stimuloj al multobliga kulturo per daŭripovaj agadoj ĉe lernejoj povas plibonigi la preparon de nova monda scenejo, en kiu vojoj al medioprotektado kuniĝas kun forta konscio pri daŭripoveco. Se ĉeestas junaj agantoj en tiaj momentoj de ŝanĝo, tiam novaj ideoj influos aliajn homojn iri la saman padon de homeca progreso.

Legio de Bona Volo (LBV) kundividis sian sperton pri Kulturo de Paco ĉe komunumoj, kie ĝi laboras, en Brazilo kaj eksterlande. Ĉe siaj lernejoj, komunumaj centroj por socia asistado kaj hejmoj por maljunuloj, tiu Instituto elvolvas sociedukajn agadojn, kiuj dialogas rekte kun teknologiaj bezonaĵoj

kaj kultura repertuaro de asistatoj.

Ĝi atentis pri la loka realaĵo, plivalorigas kulturajn radikojn de ĉiu komunumo, faciligas aliron al cifereca mondo kaj al novigaj rimedoj, starigante plurecan pripensadon, kiam ĝi aldonas al siaj agadoj valorojn de civitaneco, etiko kaj ekumena spiriteco. Por konstanta partnereco kun LBV, oni invitas al integriĝo kun la projektoj de tiu Instituto edukistojn el la publika kaj privata retoj, ĉu por prelegoj, ĉu por pedagogiaj atelieroj aŭ okaze de jare organizataj kongresoj pri edukado.

Intelektaj kaj sentoj

La Instituto zorgas pri intelekta formado kaj elvolvado de socio-ama, etika kaj intuicia potencialo ĉe la edukatoj, farante ilin intimaj al novaj teknologiaĵoj, kiuj faciligu ilian eniron en la mondon de laboro kaj plifortigu iliajn eblecojn daŭrigi studadon. Por tio, ĝi uzas propran eduksistemon, kiu konsistas el Pedagogio de Amo kaj Pedagogio de Ekumena Civitano, kreitaj de la ĉefgvidanto de la Instituto, edukanto José de Paiva Netto. Laŭ ili, la celo estas kunigi inteligentecon de la cerbo al tiu de la koro, tiel ke kapabloj kaj kompetentecoj elvolvitaj de la lernantoj miksiĝu kun etikaj, ekumenaj kaj spiritaj valoroj. Sekve, oni garantias altvaloran instruadon kaj favoras travivadon de ekumena civitaneco, surbaze de sentoj pri solidareco, paco kaj respekto al malsamecoj.

Akceptinte infanojn kaj adoleskantojn en situacio de vundebleco, same en sian reton de lernejoj kiel en sociedukajn programojn, kiujn ĝi funkciigas en pli ol 70 brazilaj urboj, LBV zorge proponas al ili aliron al komputiloj



Per sia multobliga kulturo de daŭripovaj agadoj ĉe lernejoj, LBV preparas gvidokapablajn homojn por ia monda scenejo pli inkluziviga. Dum alterna tagperiodo ĉe lernejoj, gelernantoj ĉe Instituto por Edukado José de Paiva Netto, en São Paulo, partoprenas (1) klason ĉe Laboratorio de Informadiko, (2) lernas Brazilan Gestolingvon (Libras) kaj praktikas aktivecojn (3) ĉe Laboratorio de Sciencoj.

kaj ties bazaj rimedoj. La propono pri tuteca formado — kiu inkluzivas valorojn de ia Solidara Altruisma Ekumena Socio — taŭgas kiel fundamento por ke edukatoj plu sekvu sian akademian karieron. Tiel, ankaŭ ili kontribuos por konstruado de ia kulturo favora al daŭripoveco kaj socia justeco, konscia pri la uzado de novaj teknologiaĵoj.

Natura inklino formi agantojn por daŭripova elvolviĝo montras specialan dimension ĉe la amaskomunikoj de LBV. Sekve al pedagogiaj konceptoj, Legio de Bona Volo produktas kaj/aŭ apogas edukajn materialojn por radio, televido, interreto kaj publikaĵoj. Tiu materialo estas grandparte produktata

de ekslernantoj de la Institucio (vidu artikolon sur p. 76), kio rezultas de konstanta programo de formado de profesiuloj ĉe la kampoj de aŭdvidaj kaj multmediaj rimedoj, kun progresantaj projektoj por muntado de teknika lernejo de socikomunikado. Tiu agado kongruas kun ĉiuj edukaj kaj sociasistaj vojoj de la Organizo, ĉar asistataj infanoj, junuloj kaj plenaĝuloj estas stimolataj fariĝi agantoj por multoblige daŭripovecon, kaj tiu propono akiras novajn spacojn, ĉiam kiam la komunumo mem kreas kondiĉojn por dialogo kaj plifortigas sian partoprenadon serĉe de solvoj por lokaj problemoj.

Strategioj por cifereca inkluzivigo

Ĉe formala edukado, la Institucio atentigas pri la uzado de teknologiaj rimedoj kaj klopodas aktualiĝi, ĉiam plivalorigante vojojn, kiuj respondas al individuaj bezonoj de la edukatoj, precipe, pro specialaj eduksituacioj, koncerne diagnozojn de psiko- kaj movproblemoj, kiuj ofte rezultas de problemoj de muskola kunordigado flanke de la lernanto (vidu p. 64). Multifakaj skipoj en LBV utiligas strategiojn por faciligi lernadon, surbaze de raportoj pri flegado de lernantoj farita de psikologoj, psikiatroj, fonoaŭdiologiistoj kaj edukistoj.

De tia laboro rezultas propono pri bonkvalita edukado, en alloga etoso, kiu kunigas valorojn de ekumena civitaneco al pedagogiaj agadoj, ekde plej frua aĝo. Tiu speciala maniero donas solidan socio-aman elvolviĝon, kaj tio estas faktoro, kiu starigas fundamentojn por ia tuteca formado de

.....

“La tre dezirata struktura ŝanĝo devas kalkuli, krom pri la potenco de Racio, ankaŭ pri plej bona Homa Sento; male, ĝi plu esprimados ian sensencan deziron, en kiun ĝi ofte preskaŭ transformiĝis. Urgas do kunigi la menson kaj la koron. Oni rigardu la ĉielon, sed indas, ke la piedoj firme staru surgrunde.”

la individuo, laŭ la konceptoj de la eduka vojo aplikata ĉe la lernejoj de la Institucio.

LBV pensas, ke la tutmonda socio povas profiti de solidara uzado de novaj teknologiaĵoj — speciale tiuj por informado kaj komunikado (fundamento por cifereca ekonomio) kaj tiuj sociomediaj, kiuj meritas okupi pli elstaran pozicion en la agendo de investoj de registaroj kaj privata sektoro. Legio de Bona Volo substrekas ankaŭ la bezonon, ke oni intensigu tutmondan diskutadon pri la scienca laboro mem kaj ĝia etiko, por ke progresoj en esplorado ne kontentigu logikon ekskluzive ekonomian kaj ekskludeman, kiu nur pligravigas malegalecon.

Koncerne tion, edukanto Paiva Netto atentigas: *“La tre dezirata struktura ŝanĝo devas kalkuli, krom pri la potenco de Racio, ankaŭ pri plej bona Homa Sento; male, ĝi plu esprimados ian sensencan deziron, en kiun ĝi ofte preskaŭ transformiĝis. Urgas do kunigi la menson kaj la koron. Oni rigardu la ĉielon, sed indas, ke la piedoj firme staru surgrunde.”* ■

Kulturo de Paco kapabligas por kunlabora konstruado

LBV agadas ĉe amaskomunikiloj por formi solidarajn civitanojn

Rafael Ferro

Gestoj, pentraĵoj, paroloj kaj multaj aliaj formoj de homa komunikado ĉiam klopodis esprimi perceptojn, nome rigardon al la mondo. Kvankam oni ankoraŭ diskutas pri tio, kio unue aperis, ĉu penso, ĉu lingvo (se entute ili ambaŭ estas disigeblaj), tamen estas fakto, ke ĉiu komunumo kreis siajn apartajn kodojn, valorojn, morojn, fine propran kulturon.

Eĉ havante malsamajn trajtojn, tradicioj dialogas inter si, malkovras komunajn punktojn kaj reciproke influas sin. Tia dialogo nuntempe estas pli konstanta, kun grava partopreno de Teknologioj de Informado

kaj Komunikado (TIK), kiuj alproksimigas popolojn iam longdistancajn inter si, kaj starigante interŝanĝon de ideoj kaj spertoj.

Pro tio, Legio de Bona Volo agadas per komunikperilo, kiu vasten atingas, por universale organizi defendadon de Kulturo de Paco. Tiel, ĝi elvolvis Superan Reton Bona Volo de Komunikado (radio, TV, interreto kaj publikaĵoj), kiu alvenas ĉie en la mondo, proponante gravajn enhavaĵojn por homa elvolviĝo, aparte en la kampoj de edukado, kulturo kaj civitaneco.

“Mi ricevis preparon pli ol racion”

“Mi estis lernanto ĉe Instituto por Edukado José de Paiva Netto, en São Paulo, ekde la jaro 2001, kiam mi ekalfabetiĝis. Tie, mi ricevis preparon, kiu atingas multe pli ol racion, ĉar ĝi konsideras precipe la koron kaj la sentojn, gravajn elementojn por justa socio. Nuntempe mi laboras per interreto, kiu estas medio kapabla atingi diversajn publikojn en monda nivelo, kaj mi perceptas, ke tiu perilo estas ideala por alportado de bonaj mesaĝoj al popoloj kaj nacioj, inkluzive de la plej junaj, kaj tio plifortigas en ili precipe fratan senton. Tiel, eblas transformado efektiva kaj tutmonda de mensoj kaj koroj”.

Pedro Rio (C), 19-jaraĝa, el Departamento de Publikaj kaj Interreto en LBV.



Oficiale fondita je la 1-a de januaro 1950, LBV jam ekzistis kiel ideo kaj ekumena movado ekde la radiprogramo *Horo de Bona Volo*, kiu komenciĝis monatojn antaŭe (je la 4-a de marto 1949), per Radio Globo de Rio de Janeiro, Brazilo, sub la gvidado de brazila ĵurnalisto, radikronikisto kaj poeto **Alzira Zarur** (1914-1979). Jen estas la kaŭzo, kial la Instituto firme kredas pri la socia rolo de amaskomunikiloj.

Per tio, la socieduka laboro de Legio de Bona Volo plivastigas sian influon, multe trans tiujn 100 instalaĵojn por asistado en Brazilo kaj en pliaj ses landoj, kie ĝi funkciigas aŭtonomajn bazojn: Argentino, Bolivio, Paragvajo, Portugalujo, Urugvajo kaj Usono.

Diverseco kaj kunlaborado

Gizelle de Almeida, superintendantino

Sinteno — Granda kvanto el komunik-profesiuloj, kiuj produktas la materialon elsendatan per komunikiloj de Bona Volo lernis ĉe lernejoj de LBV kaj/aŭ ricevis apogon per sociedukaj programoj de tiu Instituto. Tiuj junuloj kaj plenaĝuloj engaĝiĝas por la ideoj de Ekumena Solidareco kaj prenas lokon sur la frontlinio de movado, kiu laboras por iu pli bona mondo kaj iu pli feliĉa Homaro.



“Ĉi tie mi vekis mian naturmedian konscion”



Persona Arkivo

TV BONA VOLO

“Mi estas amazonida junulino, naskita en la urbo **Belém**, ĉefurbo de ŝtato Pará, nome regiono monde konata pro naturmediaj aferoj. Mia konsciiĝo-proceso koncerne tiun diskuton — ne nur de mia profesia kompromiso kun la verda temaro, sed de mia vivosenco mem — okazis precize kiam, je mia 14-a aĝojaro, mi komencis miajn studojn ĉe Instituto por Edukado José de Paiva Netto, en São Paulo. Tiu enirejo kondukis min al partoprenado en Junulara Movado de LBV, en kiu ni ekkomprenis, ke ĉar ni estas spiritaj kaj sociaj estuloj, tial ni devas vidi la naturan medion ne nur kiel geografian spacon. Laŭ tio, kion mi lernis, la homo estas la Naturo mem. En la jardeko post 1980, Legio de Bona Volo lanĉis kampanjon *Detruado de la Naturo estas estingado de la Homa Raso*, kiu montras la profundecon laŭ kiu la Institucio pritraktas tiun temon,

ĉiam laŭ perspektivo de Ekumena Spiriteco, kiu koncernas valorojn de Amo, Frateco kaj Solidareco, nome konceptoj jam transdonitaj antaŭ longa tempo de Ĉiela Ekologiisto Jesuo. La homo, pri kiu LBV kredas estas tutplaneda civitano konscia pri sia ekzistado, atentema pri siaj rajtoj kaj devoj kiel socispirita estulo, kaj sekve solidara pri la rajtoj de aliuloj”.

Jully Anne, 29-jaraĝa, prezentanto de programo *Biosfero*, ĉe TV Bona Volo (kanalo 20 de SKY).

pri Enmerkato kaj Komunikado de LBV, emfazas: *“Ni klopodas utiligi ĉiajn eblajn rimedojn en tuteca maniero: radio, TV, gazetaro kaj interreto, krom agado por instituciaj rilatoj, faritaj per partneraj retoj kun organizoj privataj kaj el la Tria Sektoro.”*

Per siaj komunikrimedoj, LBV ofte atentigas la registaron kaj la civilan socion pri novigoj kaj teknologiaĵoj sociaj kaj/aŭ socio-naturmediaj. Konstanta disvastigado de tiuj bonaj praktikoj estas parto de la komunikada agado. Ĝi identigas projektojn, retojn, organizojn kaj eventojn kun socia-naturmedia

celo kaj igas ilin videblaj, stimulantante partoprenadon de iliaj reprezentantoj en diskutado de grandaj temoj.



Persona Arkivo

Gizelle de Almeida

Cetere, tian naturan inklinon formi agantojn por daŭripova elvolviĝo plifortigos la baldaŭa kreo de lernejo pri tekniko de socia komunikado de Legio de Bona Volo, en la ĉefurbo de ŝtato São Paulo.

“Diverseco ne estas problemo, male; ĝi estas faktoro por pliriĉigo de socia kunvivado kaj de homa kaj spirita progreso. Kulturo de Paco, kiel kolektiva produkto, dependas de de prepariĝo flanke de ĉiu individuo por kunlaborado

“LBV kontribuis por mia vivo”

“Legio de Bona Volo kontribuis por mia vivo vekante en mi socian zorgemon pri la mondo. Mi memoras, ke mi lernis pri valoroj solidaraj, etikaj, spiritaj, en etoso de granda respekto, frateco kaj ekumenismo, ekde mia frua aĝo. Laŭgrade kiel ni maturiĝas, tiapeca pripensado kondukas nin al kritika kaj agema konsiderado pri la mondo, kie ni vivas, kaj eĉ pri niaj agoj. Mi enskribiĝis por partopreni volontulan teatrogrupon de LBV je mia 11-jara aĝo. Dum semajnfinoj ni prezentiĝis al infanoj en hospitaloj. Dum adoleskaĝo kaj junaĝo, kune kun aliaj junaj volontuloj el la Instituto, ni okazigis teatraĵojn kaj kulturajn eventojn, forumojn kaj atelierojn por diskutado en lernejoj kaj aliaj publikaj ejoj; ni partoprenis diskutojn pri publikaj politikoj pri junularo, kune kun aliaj junulaj movadoj, kaj certe tiaj spertoj influis miajn akademiasajn kaj profesiajn elektojn. Mi frekventis kursojn pri Sociaj Sciencoj ĉe Universitato de São Paulo, nome publika kaj senpaga universitato, kiu proponas la plej defian abituriantan ekzamenon en nia lando. Nuntempe, mi laboras ĉe komunikado en LBV, analizante programojn ligitajn al daŭripova evolviĝo, kaj kiel edukisto ĉe Eduka Ensemblo Bona Volo, kie mi havis la feliĉon studi.”

Daniel Guimarães, 27-jaraĝa, prezentanto de programo *Solidara Socio* de TV Bona Volo (kanalo 20 en SKY), instruisto pri Filozofio ĉe Instituto por Edukado José de Paiva Netto, en São Paulo.



Prezentisto Daniel Guimarães (maldekstre) intervjuas la ministron de Socia Asekuro, Garibaldi Alves Filho. Apude, Josué Bertolin (el TV Bona Volo).

kaj frateco”, argumentas **Paula Suéli**, kiu prezentas programon *La Temo estas Jesuo!*, per TV Bona Volo, kiu ĉiumonate disponigas pli ol 84 horojn da analizoj kaj studoj pri aktualaj temoj kaj defioj, ĉiam surbaze de universalaj valoroj de Frateco, Solidareco, civitaneco, sub la inspira ekzemplo de Jesuo, la Ekumena Kristo, la Dia Ŝtatestro.



Paula Suéli

Tutmondan travivadon de Kulturo de Paco resume klarigas la kreinto de Supera Reto Bona Volo de Komunikado, Paiva Netto: “(...) *La vera liberigo de la homo kaj de lia Senmorta Spirito estos tiu, kiun plifortigos kulturo de re-*

ciproka respekto, kies riĉeco konsistas en multeco de ideoj favoraj al Paco inter ĉiuj. Ĝi alvenos ankaŭ per Instruado kaj per Edukado, prilumitaj de senco pri Spiriteco, kiu estas Amo kaj Justeco, Scienco kaj Amo, por ĉiuj etnoj.”

Retaj socio-naturmediaj teknologiaĵoj

Alia strategio de Legio de Bona Volo en tiu proceso de ŝanĝado de sociaj kaj kulturaj paradigmoj estas la ĉeestaj renkontiĝoj rete interligitaj, kiuj kontribuas por ia pli granda kunordigo inter institucioj. En la jaro 2012,



Fotoj: Vivian R. Ferreira



Brasília, Brazilo — En plenplena Parlamundi de LBV, la publiko partoprenas la 7-an Intersektoran Forumon Reto Solidara Socio — 4-an Foiron de Novigaĵoj apoge al Ministeria Jara Revizio de Ekosok, en la jaro 2010. En detala kadro, d-ro Andrei Abramov, estro de Sekcio de NRO-oj de Departemento de Ekonomiaj kaj Sociaj Aferoj de Unuiĝintaj Nacioj (UN/DESA).

ok brazilaj municipoj en kvar grandaj landaj regionoj estis sidejoj de eventoj por kapabligo de administrantoj kaj sociaj edukistoj, kun la partopreno de diversaj partneraj organizoj.

Tiajn iniciatojn oni organizas en la kadro de Reto Solidara Socio, sub la inspiro de proponita ideo, farita jam en la jardeko post 1980, fare de Paiva Netto.

Konstrua intersektora kunlaborado

Intersektora Forumo kaj Foiron de Novigaĵoj Reto Solidara Socio, nome evento okazanta ekde la jaro 2004 fare de LBV, ĉiujare kunigas en kvin latinamerikaj landoj (Argentino, Bolivio, Brazilo, Paragvajo kaj Urugvajo) reprezentantojn de la civila socio kaj de publika kaj privata sektoroj por diskuti pri progresoj, defioj kaj

alternativoj por plenumado de la ok Jarmilaj Evoluigaj Celoj (JEC), kiu estas aro da mondaj celoj proponita de Unuiĝintaj Nacioj. Ĝiajn konkludojn oni poste alportas al Altnivela Kunsido de Ekosok (Ekonomia kaj Socia Konsilantaro de UN). Ekde la unua evento, la forumo kalkulas je la apogado de la Departemento de Ekonomiaj kaj Sociaj Aferoj de Unuiĝintaj Nacioj kaj de pluraj organizoj de Sistemo UN en tiuj landoj.

En la jaro 2012, okaze de unu speciala, tia forumo, oni prezentis Seminarion Konstrua Kunlaborado, nome altnivela temo-panelo organizita en kunteksto de oficiala programo de Rio+20 (Konferenco de Unuiĝintaj Nacioj pri Daŭripova Elvolviĝo), okazinta en Brazilo. Ĉeestis tiun eventon reprezentantoj de la brazila Senato, de la akademia kaj entreprenista medioj kaj de la amazonia regiono, ĉiuj ligitaj al la agendo por daŭripoveco. En tiu kunsido, oni amplekse diskutis la rolon de scienco kaj teknologio ĉe daŭripova elvolviĝo

Unu el la prelegintoj, d-ro **Andrei Abramov**, estro de la Sekcio pri NRO-oj de UN/Desa, komentis: “*Ĝi estis unu el la eventoj, kiuj probable havos pli da daŭra efiko je la partoprenintoj. Kun pli sentema senco pri tuja agado, pri kontribuado al kompreno pri tio, kio efektive estas daŭripova elvolviĝo, neregistaraj organizoj, registaroj kaj Unuiĝintaj Nacioj povas labori partnere.*” Kaj d-ro Abramov kompletigis: “*Estas ĉiam plezure kunlabori kun niaj amikoj el Legio de Bona Volo. Ĝi estas tre bona organizo. Ĝi agadas solide, kaj plej grave, fide, rilate la laboron kun Unuiĝintaj Nacioj. Dankon!*” ■

Confie no poder dos sonhos.
Realize os seus.



CIVIC LXR e EXR

2014 | Novo Motor **2.0**

Câmbio Automático,
mais potência e tecnologia

FIT
twist

LANÇAMENTO
O Honda com um
Twist de ousadia.

NOVO FIT
2014



Honda Consórcio Nacional
produção a partir de **R\$ 564,79***



ATENDIMENTO EXCLUSIVO
LIGUE ANTES PARA UM DE Nossos
REPRESENTANTES ESPECIALIZADOS



LIGUE
0800 282 5000
e agende suas revisões

TODOS OS MODELOS COM ATÉ
5 ANOS DE GARANTIA TOTAL!



HONDA

RIO TÓKIO - BOTAFOGO

Rua Real Grandeza, 400

21 **2114-0400**

www.riotokio.com.br

RIO TÓKIO - BOTAFOGO

Rua General Severiano, 201

21 **2122-4999**

www.riotokio.com.br

RIO TÓKIO - RECREIO

Avenida das Américas, 14.001

21 **2323-9000**

www.riotokio.com.br

NARITA - BARRA

Avenida das Américas, 2001

21 **3987-8888**

www.hondanarita.com.br

Condições válidas para a data da publicação e veículos disponíveis para pronta entrega em nossos estoques. A garantia estendida de 5 anos é opcional e possui um custo adicional de R\$ 1.850,00. *A condição do Consórcio Nacional Honda no valor de R\$ 564,79, refere-se a 65% da carta de crédito para aquisição do New Fit LX, câmbio manual - 1.4 - 101 CV - Flex - ano 2013/2014. O valor da carta de crédito é de R\$ 34.315,00. Reservamo-nos o direito de corrigir possíveis erros de digitação. Fotos meramente ilustrativas.

Respeite os limites
de velocidade





LBV

LBV DE BRAZILIO

Rua Sérgio Tomás, 740 • Bom Retiro • São Paulo/SP
CEP 01131-010 • Tel.: (+5511) 3225-4500
www.lbv.org • www.bonavolo.com

LBV DE ARGENTINO

Av. Boedo, 1.942 • Boedo • Buenos Aires • CP 1239
Tel.: (+5411) 4909-5600 • www.lbv.org.ar

LBV DE BOLIVIO

Calle Asunta Bozo, 520 • Zona Alto Obrajes (sector A)
La Paz • Casilla de Correo, 5951 • Tel.: (+5912) 273-3759
www.lbv.org.bo

LBV DE PARAGVAJO

José Asunción Flores, 3.438 con Solar Guaraní • Bernardino
Caballero • Asunción • Tel.: (+59521) 921-100/3
www.lbv.org.py

LBV DE PORTUGALIO

Rua Comandante Rodolfo de Araújo, 104 • Bonfim • Porto
CP 4000-414 • Tel.: (+35122) 208-6494
www.lbv.pt

LBV DE URUGVAJO

Bulevar José Batlle y Ordoñez, 4.820 • Aires Pures
Montevideo • CP 12300 • Tel.: (+598) 2304-4551
www.lbv.org.uy

LBV DE USONO

36 W 44th Street • Mezzanine
Manhattan • New York • 10036 • Tel.: (+1646) 398-7128
www.legionofgoodwill.org



facebook.com/BonaVolo



youtube.com/PortaloBonaVolo

**EKHAVU TIUN REVUON EN VIA
TABULKOMPUTILO AŬ TELEFONKOMPUTILO
ENŜUTU LA LEGILON**



QR Code, fotu la
kodon kaj enŝutu
la senpagan
programaplikilon